IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 39 - trimonata
09/2

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Luiza Carol
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Aida Čižikaitė
Xosé Conde
Renato Corsetti
Dennis Keefe
Małgosia Komarnicka
Zsófia Kóródy
Katalin Kováts
Stefan MacGill
Svetlana Mirošničenko
Josip Pleadin
Franz-Georg Rössler
Gennadij Šilo
Humphrey Tonkin
Julianna Vas-Szegedi





ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: *Enkonduko*..... 3
Denis KEEFE: *Du- aŭ triŝtupa klasifiko de la kursaro de E-o?*..... 4
Humphrey TONKIN: *Vastigi la difinon de lingvo*..... 10
Luiza CAROL: *La pedagogia valoro de kuirado*..... 14
Svetlana MIROŜNIĈENKO: *De teorio al praktiko: analizo de poeziaĵo* 16
Renato CORSETTI: *Claude Piron mortis. Vivu la bona lingvo!... (rec.)* 20
Katalin KOVÁTS: *Taksu objektive viajn lingvokonojn* 21
Xosé CONDE: *Unua leciono de la galega lingvo per rekta metodo*..... 25
Gennadij ŜILO: *Ĉu lingvo dum 7 tagoj estas miraklo?* 26
Rob MOERBEEK: *Erarologio* 30
Franz-Georg RÖSSLER: *Legantoletero por IPR*..... 32
El landoj kaj sekcioj (GB, DE, HU, CZ, PL, SI, US) 33
Intervjuo kun la rektoro de nia konferencejo (J. PLEADIN/M. KOMARNICKA) 39

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, <atilioorellanarojas@gmail.com>.* Sekretariaj taskoj. Ekzamenoj.

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>.* E-centroj, instrukapabligado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319,<trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho, Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

Titolpaĝe supre: Dennis KEEFE instruante ĉe la Universitato de Nankino (p.4); *malsupre*: trilanda kunlaboro de bazlernejoj (de maldekstre): Ilona FEDOR, Zsófia KÓRÓDY, Tim MORLEY (p.33).

La nunan numeron ni sendis al la presejo 20 aprilo, redaktofino por la sekva numero 15 aŭgusto 2009.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko
***Membroj*:**
Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]
Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre
Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet
***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto
[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Enkonduko

Laŭ legendo, la hungardevena reĝidino Sankta Kinga, la edzino de la pola reĝo, Boleslav la Hontema, perdis sian ringon en salminejo de Transilvanio, kiun ringon oni poste retrovis en salminejo de Wieliczka apud Krakovo. Jen unu plia kaŭzo por partopreni nian Konferencon: se Vi perdis ion ajn – ĉu materian, ĉu spiritan – venu al Krakovo, partoprenu la duontagan ekskurson al Wieliczka kaj vi trovos, kion vi perdis. (Vidu la fotojn sur la dorsa kovrilo, kie, laŭ la decido de la estraro, ekde nun la listo de sekciestroj kaj reprezentantoj aperos nur unufoje jare.)

Por la nuna numero venis eĉ du ĉefartikoloj, nepre legu la fakartikolojn de KEEFE kaj TONKIN. En la antaŭa numero vi povis legi artikolon de MIROŜNIĈENKO pri la instruado pere de poeziaĵoj, nun ŝi daŭrigas la temon per konkreta ekzemplo.

Revuomeze vi trovos memtaksilon laŭ la *Komuna Eŭropa Referenckadro* kun enkonduka teksto de K. KOVÁTS. La sistemon adaptis al E-o ILEI-anoj, sed – kvankam mi estas tute malkompetenta pri la temo – mi ĝojus, se ILEI ankaŭ oficiale kaj aktive partoprenus la funkciigon de la nova ekzamensistemo.

Bonan legadon!

Jozefo Németh,
redaktoro

Du- aŭ triŝtupa klasifiko de la kursaro de E-o?

Malsamaj enhavoj por lerni *la lingvon, kaj* uzi *la lingvon?*

de Dennis KEEFE, (*keefeinchina@gmail.com*)

Ni instruistoj de E-o bone konas la kutiman trinivelan organizadon de kursoj instruataj de multaj lokaj E-asocioj. En tia kursaro okazas bazaj kursoj por komencantoj. Poste, sed ne tiel ofte, estas kursoj por progresantoj. Kaj finfine, depende de la loka asocio de E-o, ekzistas kurso por spertaj esperantistoj. Tiu trigrada ŝtuparo de tempo al tempo troviĝas ankaŭ en internaciaj aranĝoj kiel tiuj de la Kastelo de Grésillon en Francio, aŭ NASK en Usono. Sed ĉu estas alia maniero pripensi la ŝtuparan aranĝon de kursoj? En ĉi tiu artikolo, mi volas starigi la demandon ĉu tiu trinivela klasifiko de E-kursoj estas la plej bona maniero pripensi la starigon de lokaj kaj internaciaj E-kursoj, aŭ ĉu dunivela klasifiko povus esti pli fruktodona kaj por lernado kaj por organizado de kursoj.

La aranĝo de lingvokursoj laŭ niveloj estas normala afero. Kiam mi lernis la germanan lingvon ĉe la Goethe-Instituto en Germanio, tiu lernejo tiam havis 7 aŭ 8 nivelojn por lingvolernado. En publikaj lernejoj en multaj landoj, lernado de la angla kaj aliaj lingvoj daŭras multajn jarojn tra elementlernejoj, mezlernejoj kaj altlernejoj kaj en ĉiu jaro de la lernejo estas progresive pli alta lingvonivelo. Ĉe la Instituto Cervantes de Ĉikago, estas 14 niveloj entute por lerni la hispanan lingvon. En la organizado de fremdlingvaj kursoj povas ekzisti eĉ pli da niveloj. Ekzemple, ĉe la internacia lernejo Berlitz, kiam mi instruis tie en Madrido en la 1980aj jaroj, estas senfina nombro da niveloj, ĉar la nivelo dependis de la preciza paĝo de la leciono en la instrulibroj, kaj tiuj lernolibroj havis centojn da paĝoj.

Do por multe da internacie instruataj lingvoj ekzistas multe da niveloj por la gelernantoj, sed mi pensas, ke ni ĉiuj instruistoj kaj instruantoj de E-o dirus, ke E-o, estanta multe pli simpla lingvo, ne bezonas tiom da niveloj kiel por la tradiciaj instruataj lingvoj. Sed ĉu ĝuste kursaro el tri fundamentaj ŝtupoj estas la plej bona maniero koncepti nian kursaron? Se E-o estas multoble pli facila ol la germana kaj lernejo dividas la germanan lernadon en sep nivelojn, ĉu ni bezonas la tradiciajn tri nivelojn por lerni la gramatikon kaj vortfaradon de E-o?

Mi pensas, ke eblas rigardi la instruadon de E-o tra alia lenso. Anstataŭ koncepti la E-an kursaron kiel bazan kurson, mezan kurson kaj superan kurson, ni eble pensu pri la instruado de E-o per nur du niveloj aŭ fazoj: unue, la lernado de la lingvo mem, kaj due la utiligado de la lingvo por lerni ion alian. Do, en la unua fazo, la gelernantoj lernas la lingvon. Ili studas la gramatikon. Ili lernas la Esperantan vortfaradon, kaj enkapigas multe da radikoj kaj vortoj. Ili komencas paroli kaj legi flue. Ili ankaŭ ekkonas la Esperantan kulturon kaj literaturon iomete. En tiu unua fazo, niaj gelernantoj lernas preskaŭ la kompletan gramatikon kaj vortfaradon de E-o kaj ne plu bezonos kursojn pri tiuj temoj poste. La gelernantoj restas en tiu unua nivelo ĝis ili sukcese finas ĝin. Mi volas emfazi ĉi tie, ke, laŭ mi, bazkurso de E-o povas enmeti la tutan gramatikon kaj tutan vortfarad-sistemon de la lingvo. Kompreneble tia bazkurso estos multe pli longa ol tradicia kurso, sed estus pli bone enmeti preskaŭ la tuton en unu kurson antstataŭ lasi al la gelernantoj perdiĝi en la labirinto de eblaj mezkursoj de E-o, kie mankas lernolibroj kaj serioza pritraktado de tio kio estas meznivela kurso kaj meznivela esperantisto. La ĝusta enhavo de tia kurso estas ekster la kadro de ĉi tiu artikolo, sed tamen en venontaj jaroj la replano de la enhavoj de bazkursoj meritos multe pli da pensado fare de niaj elstaraj instruistoj, instruantoj, pedagogoj, profesoroj kaj verkistoj de lernolibroj. Mi diru ĉi tie, ke aŭ lernanto lernas la lingvon aŭ lernanto utiligas la lingvon por lerni ion alian.

En la sekva dua fazo, la gelernantoj, laŭ mia skemo, uzas E-on por lerni ion alian, kaj tiamaniere akiri E-on por ĝia internacia apliko kaj uzo. En tiu dua nivelo aŭ fazo, estas multege da vojoj laŭ kiuj oni povas lerni per E-o, kaj poste en dua parto de ĉi tiu artikolo, mi priskribos iom detale kelkajn el ili. La ĉefa principo de tiu dua fazo estas, ke la gelernantoj uzas E-on studante ne lingvajn kaj gramatikajn temojn, sed lernante pri nia mondo, nia socio, literaturo kaj homaro, scienco, internacieco kaj eble komerco. La gelernantoj povas, ekzemple, studi esperantologion kiel nuntempe okazas fare de Ilona KOUTNY en Pollando. Kaj krome, la gelernantoj povas lerni faktemojn pri scienco, historio, internacia kulturo, geografio, sociologio, psikologio kaj juro. La ĉefa afero, laŭ mi, estas, ke en tiu dua fazo, la lernado okazos en la lingvo E-o, kaj la plejparto el la kursoj estos pri negramatikaj kaj neleksikaj temoj. Mi ne diras per tio, ke ne bonvenas en la dua fazo kursetoj pri Esperanta gramatiko aŭ vortfarado. Mi volas substreki nur, ke la plejparto de la lernado pri la lingvo mem jam

devis okazi en la unua fazo de la lernado. Resume: en la unua fazo, preskaŭ la tuta kurso pritraktas la sukcesan akiron de la lingvo mem, dum en la posta dua fazo, preskaŭ la tuta kurso estas pri lernado de aliaj aferoj per la lingvo E-o.

Mi scias, ke tia prezento de la Esperanta kursaro ne kongruas kun nia nuntempa pensmaniero pri kurso-enhavo kaj pri ekzamenoj. Ekzemple, la ILEI-ekzamenoj havas du nivelojn, certe, sed tiuj niveloj ambaŭ rilatas ĉefe nur al la unua fazo de mia skemo. Tio estas, ili pritraktas la lingvon mem, kaj ne speciale la utiligadon de tiu lingvo, almenaŭ ne la uzon ekster la komunumo de esperantistoj. Aliekzemple, kvankam la unuaj kvar niveloj de la KERK, Komuna Europa Referenco-Kadro ĉefe rilatas al la unua fazo de mia skemo, tamen la lastaj, plej altaj niveloj de KERK ne rilatas al la dua fazo ĉar tiuj altaj lingvaj niveloj limiĝas ĉefe al la lingvo mem kaj ne al la uzo de tiu lingvo por lerni pri aliaj temoj.

Mi scias ankaŭ, ke tiu dufaza modelo ne bone estas konforma al la nuntempa realo de E-instruado. Nuntempe multe da E-asocioj kaj kluboj proponas kursojn, kiuj ne havas sufiĉe da horoj por vere lerni uzi E-on. Estas multe da urboj, kie troviĝas kursoj kiuj daŭras nur 20 aŭ 30 horojn en unu jaro kaj tiu kvanto da tempo ofte ne sufiĉas por bone lerni la E-an gramatikon, speciale se ni postulas aktivan uzadon de tiu gramatiko.

Kiom da instruhoroj estas bezonataj por atingi sufiĉe bonan nivelon de E-o en tiu unua fazo de lingvolernado? Mi ne scias, sed mi pensas, ke se la kursoj estas bonaj, kaj se la gelernantoj sufiĉe celkonsciaj, la kursodaŭro povas esti inter 70 kaj 100 horoj. Almenaŭ tion mi spertis per la BEKkurso (*www.bekkurso.info*) en Hispanio, Usono kaj Francio. Tiu 100-hora kursodaŭro grande preterpasas la kvanton da horoj, kiujn la plejparto el la E-asocioj povas aŭ volas doni. Kaj sciu, ke ĉi tie mi parolas nur pri la bezonata kvanto da horoj por parolantoj de eŭropdevenaj lingvoj. Por multaj azianoj, kiuj ne ĝisfunde lernis iun eŭropan lingvon antaŭe, la lernohoroj povas esti ĝis kvinoble pli.

Ĉiaokaze, se en la unua fazo de lernado de la lingvo E-o, la gelernantoj sufiĉe bone lernas la lingvon, kion tiuj kursanoj povas lerni poste, utiligante nur la lingvon E-o? Multaj esperantistoj pensas, ke sufiĉas ke E-kursoj instruu pri E-kulturo, ekzemple, pri niaj eventoj, asocioj, ideoj pri paco, ktp. Iasence tiu sinteno pritraktas la studon de ni mem kiel socia fenomeno. Aliaj e-istoj kredas, ke bona vojo estas lernado pri esperanto-

logio, kaj speciale pri la lingva naturo de E-o kaj de planlingvoj. Mi ne kontraŭas tiujn vojojn, kaj mi eĉ forte aplaŭdas ilin, tamen estas aliaj vojoj por fari tutan kursaron de E-o, kiujn ni ankoraŭ ne sufiĉe prikonsideris.

Mi volas sugesti en ĉi tiu artikolo, ke ni pensu pri aliaj manieroj organizi la enhavojn de kursoj por personoj, kiuj jam parolas bone la lingvon. Tio estas, mi volas proponi, ke ni pripensu multe pli la starigon de kursoj de la dua fazo, en kiu oni uzas E-on por studi ne-esperantlingvajn temojn. Povas esti granda ŝanco por E-o, ĉar se ni sukcesas elpensi novajn kursojn kiuj utiligas E-on ne por lerni E-on aŭ lerni pri ni mem, ni eble povas altiri la atenton de tiuj kiuj nun dubas pri la praktika valoro de E-o. Jes ja, jam prezentiĝis kursoj pri neesperantaj temoj, ekzemple ĉe AIS, sed ĉu tiuj kursoj estis sufiĉe longedaŭraj kaj ĉu ili pli bone klasifikiĝas kiel mallongaj faktemaj seminarioj? Krome, ĉu tiuj kursoj estas facile ĉeesteblaj de ĝenerala publiko? Alivorte, ĉu tiuj kursetoj, bonegaj laŭ mi, konvinkas la neesperantistaron pri la granda utilo de E-o?

Ni rigardu iom pli detale kelkajn alternativojn de kursovojoj por tiu dua fazo de E-kursaro. Unue, mi prezentos kelkajn eblojn por tre elstaraj, altnivelaj uzoj de E-o je internacia nivelo, kaj poste, mi sugestos kelkajn eblojn por lokaj asocioj de E-o.

Ĉe internacia nivelo, unu ebla temo por la dua fazo de instruado de E-o povas esti kursaro pri nia mondo mem, pri internacieco. Estus bone, ekzemple, por komenci kompreni la mondon, ke mondcivitanoj konu la geografion kaj demografion de nia mondo. Estus bone ankaŭ, ke ili lernu pri la diversaj manieroj komuniki ne nur per lingvo, sed ankaŭ per gestoj kaj alimaniere. La kutimoj pri la bona korpa distanco inter du interparolantoj, ekzemple, varias en nia mondo, kaj tion bona Esperanta komunikanto devas lerni, por efike uzi la lingvon. Internaciaj kutimoj, internacia kulturo, internacia historio estas temoj, kiujn E-o povus pritrakti eble pli bone ol aliaj lingvoj se ni havus kursojn pri tiuj temoj. Alia maniero priprensi la enhavon de tia kursaro estus havi kursaron pri internacia paco. Kion oni devas instrui en kursaro, por ke civitanoj el ĉiuj landoj bone edukiĝu pri paco kaj internacia harmonio? Se ni esperantistoj havus tiun temon kiel kernon de E-kursaro, ni eble komencus ricevi la aprobon, apogon kaj eĉ subvenciojn de nombraj internaciaj organizoj, kiuj nun kritikas E-on, ĉar ili ne vidas la praktikan aplikon de nia internacia lingvo.

Alia kursaro je internacia nivelo povas esti pri sciencaj temoj. Lerni biologion, kemion, fizikon kaj aliajn sciencojn probable ankaŭ eblos venontece per E-o. Ĉi tie mi ne parolas pri dusemajna kurso pri ero de, ekzemple, biologio, sed tuta kurso, kiu rekte similas tiujn de niaj lernejoj kaj speciale tiujn de niaj universitatoj. Se la kolekto de sciencaj kursoj iĝos sufiĉe granda kaj sufiĉe altkvalita, ili povas servi kiel "universitato" kie studentoj el multaj landoj povas ĉeesti. Estas multaj landoj en nia mondo kie tia universitato estus bonvena. Krei tian kursaron antaŭe estis nerealigebla revo, sed per la interreto hodiaŭ, ĝi eble post kelkaj jaroj povos komenci realiĝi. Se teamo de niaj kleraj esperantistoj kapablas ekigi la aferon, eble tiam ekaperos subvencioj por daŭrigi la laboron. Studi sciencon per E-o eble ne allogas usonanojn kaj eŭropanojn kiuj havas ĉion kion ili bezonas por lerni tiujn temojn anglalingve aŭ per iu eŭropa lingvo, sed por aliaj mondanoj, kiuj loĝas en landoj kie alproprigo de tiuj lingvoj estas tre multekosta kaj longedaŭra afero, E-kursaro pri scienco povas esti bona vojo.

Alia kursaro en la dua fazo povus pritrakti komercon. Mi mencias ĉi tiun fakon, ĉar granda parto de la nuntempa lernantaro de la angla kiel internacia lingvo studas tiun lingvon por uzo en internacia komerco. Kutime tiuj kursoj prezentas la mondovidpunkton de komercistoj kaj universitatanoj el Usono, kaj tiu vidpunkto ofte ne kongruas kun alilandaj kaj alikulturaj vidpunktoj. E-kursaro povas doni alian guston al la studado de internacia komerco. Aliflanke, simile kiel la avantaĝo de la scienca instruado, komerca kursaro en E-o prezentas pli malmultekostan alternativon al la lernado de malfacila lingvo (la angla), kaj de malfacila ĉeesto de kursoj en altekostaj landoj kiel en Usono aŭ en eŭropaj landoj.

Krei kompletan kursaron pri la studobjektoj internacieco, scienco kaj komerco ĝis nun ne estis realigeble, kaj ankoraŭ restos multege da obstakloj por fari tion. Tamen per la Interreto kaj la starigo de kursoj en ttt-paĝoj, tiu laboro povos komenciĝi. Sufiĉas, ke unu profesoro pri ajna universitata studtemo, ekzemple, fiziko, estu filmata dum li klarigas kurson en E-o. Tiaj filmoj, kiel modeloj, jam ekzistas en la angla lingvo ĉe la universitatoj *Berkeley* kaj la *Massachusetts Institute of Technology* en Usono. Eĉ ne bezonatas filmoj, surbendigitaj klarigoj akompane de notoj povos doni bonan kurson pri pluraj temoj.

Do eblas diversaj vojoj por starigi kursaron en E-o por la dua fazo je internacia nivelo, sed kion povas fari iu loka grupo de E-o kiu tute ne

emas starigi grandskalajn projektojn kaj tute ne havas rimedojn por starigi vastaskalajn kursojn? Kiel niaj lokaj grupoj povos starigi interesajn kursojn kie E-o, en dua fazo, estas uzata por lerni ne E-on sed ion alian? La ideo starigi kursojn pri komerco aŭ scienco aŭ internacieco ne aplikiĝas al niaj lokaj grupoj, ĉar tiuj temoj bezonas elstarajn, fakajn instruistojn unuflanke, kaj tiuj temoj ne estas sufiĉe ĝeneralaj por kontentigi bezonojn kaj interesojn de membroj en loka asocio. Pro tio, la lokaj asocioj povas starigi kursojn, kiuj eble pli rilatas al E-o mem, utiligante librojn disponeblajn ĉe niaj libroservoj aŭ utiligante la Interreton por havi riĉan legomaterialon, sur kiu povas baziĝi interesaj kursoj.

Ekzemple, oni povas starigi tutan kurson pri literaturo utiligante la librojn de Claude PIRON. Sperta esperantisto povas gvidi grupon, starigante demandojn pri la eldonaĵoj kaj la okazaĵoj de la *Ĉu-Libroj* de PIRON, ekzemple. En alia modelo de kurso, la gelernantoj mem povas legi diversajn librojn hejme, kaj ĉiu lernanto povas rakonti pri sia plej ŝatata libro dum la leciono. Vikipedio povas esti bona fonto de buntaj artikoloj pri multaj temoj kiuj povas esti studataj dum iu kurso de la dua fazo de E-lernado.

La ĉefa afero estas, ke tiuj instruistoj kaj tiuj studentoj en la dua fazo bone memoru, ke la celo de la kursoj ne estas rekte studi la lingvon E-on, sed uzi tiun lingvon por lerni pri io alia. Per tiu metodo, tamen, eĉ se ili ne rekte studas la lingvon, iliaj gramatiko, parolkapablo, vortostoko kaj flueco pliboniĝas ĉar ili abunde uzas la lingvon. Sen tia uzo, ilia nivelo de E-o povas resti je tro teoria fazo.

Ni substreku, ke la unua fazo de kompleta E-kursaro celas, ke la kursfininto ne plu uzos la plejparton el sia tempo por studi E-on kiel lingvon. Ĉe la fino de la unua fazo, la lernanto kapablas uzi la lingvon por paroli, por legi, por diskuti kun spertaj e-istoj enlande kaj eksterlande. Iasence, ni prikonsideru tiun unuan parton de E-lernado kiel la jarojn da kursoj pri la angla lingvo, kiujn studento el, ekzemple, Hispanio aŭ Germanio bezonus por sukcesi komenci studojn pri biologio, fiziko aŭ pri komerco ĉe tipa usona universitato. Por eniri usonan universitaton, eŭropano devas studi la anglan lingvon dum jaroj, poste sukcesi je ekzameno kiu nomiĝas TOEFL (*Test of English as a Foreign Language – Ekzameno pri la Angla Lingvo kiel Fremdlingvo*), kaj poste studi ĉe usona universitato. Simile en E-o povas ekzisti la tempo por lerni la lingvon (la

unua fazo), kaj poste por uzi la lingvon por lerni aliajn temojn, ekzemple, pri biologio, fiziko aŭ komerco (la dua fazo).

Pripensi la starigon de nova dufaza modelo por E-o povas esti fruktodona vojo por repensi nian aliron al la instruado de E-o. Se en la unua fazo de la lernado, ni devas meti ĉion kion la lernanto bezonas por poste sukcese utiligi la lingvon, eble finiĝos la ekzisto de tro mallongaj kursoj kiuj helpas al lernantoj komenci lerni E-on, sed kiuj ege malofte finas la taskon. Dum la historio de E-instruado eldoniĝis dekoj kaj eĉ centoj da lernolibroj por komencantoj, sed tamen ege malofte ni trovas libron kiu idealas, por ke tiuj lernantoj transiru de baza al meza nivelo de lernado. Alivorte, ni komencas instrui al ili kiam facile ili mem lernas la bazajn nociojn pri nia gramatiko, sed kiam la lernanto vere bezonas instruiston kaj lernomaterialon, subite taŭga kurso ne aperas, aŭ nur disponeblas ĉe niaj famaj lingvaj kursoj kiaj Grésillon aŭ NASK. Meti la tuton instrueblan en la unuafazan kurson kuraĝigos nin instruistojn kaj verkistojn de lernolibroj solvi tiun problemon.

La dufaza modelo ankaŭ permesos al ni dediĉi pli da tempo kaj homforto al la tasko fari ion konkretan kaj utilan per E-o. Se ĉiuj el niaj gelernantoj pensas, ke la celo de E-o estas uzi ĝin por akiri aliajn konojn kaj sciojn, ili eble uzos pli da tempo por bone regi la lingvon unue, por poste ĉeesti, fizike aŭ interrete, kursojn pri temoj kiuj helpos al ili lerni pri ni mem kaj pri nia mondo. Persone mi pensas, ke dum estas utile lerni pri E-o mem, estas pli utile lerni pri internaciaj kutimoj, internacia historio, scienco kaj internacia komerco, ĉio ĉi pere de E-o. Kaj, kara leganto, kion vi mem pensas pri ĉio ĉi?

Dennis KEEFE, Univ. de Nankino (Nanjing Da Xue), Ĉinio, apr. 2009

Vastigi la difinon de lingvo

de Humphrey TONKIN (Britio/Usono, tonkin@hartford.edu)

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis peton de dekano ĉe la Universitato Harvard. Ŝi aŭdis, ke mi instruas en mia universitato kurson pri Lingvo kaj Socio laŭ iom originala maniero, kaj ŝi legis kelkajn miajn anglalingvajn artikolojn, en kiuj mi argumentis, ke lingvoinstruistoj ofte ne kaptas la

bazan principon pri lingvoj – nome, ke ili estas unuavice sociaj institucioj. Ĉu mi povus (ŝi demandis) viziti Harvard por prezenti miajn ideojn en kunsido de profesoroj pri lingvoj kaj en renkontiĝo de tiuj, kiuj instruas bazajn fremdajn lingvojn al la studentoj?



Tiu peto eble ŝajnos surpriza al homoj el ekster Usono, aŭ almenaŭ el ekster la angleparolantaj landoj. Jen la plej prestiĝa usona universitato – tiu, kiu devus troviĝi en la avangardo inter fakuloj pri lingvoinstruado – petas helpon pri konstato tiel fundamenta kaj facila, ke ĝi devus esti komprenata de ĉiu instruisto de lingvoj. Bedaŭrinde, tamen, en Harvard kiel aliloke, nek tiuj, kiuj instruos aŭ instruas lingvojn en universitatoj, nek tiuj, kiuj tion faras aŭ faros en elementaj kaj mezaj lernejoj, studas aŭ studis lingvojn el socia vidpunkto. Male, ili plejparte venas al siaj respektivaj lingvoj pere de la literaturo de tiuj lingvoj: ili legas tekstojn, studas literaturan kritikon, kaj lernas kiel plej efike instrui la norman lingvon al siaj lernantoj. Por ili, la lingvo estas ilo por atingi komunikan kapablon en la elito de la koncerna parolantaro; ĝi emfaze ne estas rimedo por elpaŝi ekster la limojn de la propra lingvo por atingi pli vastan mondon, sed rimedo por enpenetri difinitan socian tavolon en difinita lando aŭ landaro.

Tra multaj jaroj kiel universitata administranto – profesio, kiun mi sekvis en paralelo al mia rolo kiel profesoro – mi eĉ frue eltrovis, ke la profesoroj de la unuopaj lingvoj ofte ne estas pli malfermaj al la kulturoj kaj lingvoj, kiujn profesoroj de aliaj lingvoj instruas. La profesoroj pri la hispana lingvo ofte havis kaj foje esprimis siajn antaŭjuĝojn pri la francoj aŭ la germanoj, kaj inverse. Profesoroj pri malpli ofte instruataj lingvoj estis eble iom pli malfermaj, ĉar ili tamen devis trakti kun kolegoj el diversaj disciplinoj aŭ diversaj lingvoj. Sed la strikta kaj mallarĝa alrigardo de la ŝovinisto foje kolorigis la vidpunkton de la profesoroj de la "grandaj," ofte instruataj lingvoj. Mi nomis tiun fenomenon "dutraka ŝovinismo."

Se unu el la celoj de lingvolernado estas vastigi la perspektivon kaj kultivi la toleremon, tiu maniero aliri la lingvojn neniel kontribuis al tiu celo. Temis ankaŭ pri starpunkto, kiu emis emfazi la nocion, ke lingvo estas iel kompleta estaĵo, kiun oni povas iamaniere kapti kaj regi – ke ĝi estas senmova, kaptebla inter la paĝoj de vortaro aŭ gramatika manlibro.

Malgraŭ la ofte heroaj laboroj de kelkaj lingvoinstruistoj usonaj, tiu miskoncepto kaj mispercepto de lingvoj estas la ĉefa obstaklo (laŭ mia juĝo), kiu malhelpas la lernadon de lingvoj en Usono kaj ankaŭ la akcepton de lingvolernado kiel baza elemento en ĉies edukado. Usonaj pledantoj por lingvoinstruado rezonas tro ofte per maltaŭgaj argumentoj, kaj la pozicio de lingvoinstruado en la politiko de edukado daŭre falas.

Mi bone komprenas, ke edukado estas formo de elitigo: ni celas per klerigo doni avantaĝojn al la lernantoj, tiel ke ili sukcesu en nia socio. Sed edukado estas ankaŭ malfermilo al la mondo. Do, bone, ke niaj instruistoj de la hispana instruu al siaj lernantoj la arton paroli al la elituloj de Madrido aŭ Meksikurbo, aŭ la kapablon enpenetri la misterojn de la grandaj hispanlingvaj literaturaj verkoj – sed akiro de la hispana lingvo estu ankaŭ vojo por aprezi la kulturan diversecon de la hispanlingvaj landoj, kaj la formojn de sinesprimo je diversaj niveloj de la socio kaj en diversaj lokoj. Ĝi estu instrumento de demokratio kaj egaleco, ne nur instrumento por firmigi elitojn. Eĉ pli grave, akiro de la hispana lingvo estu vojo al kompreno, ke oni kapablas per lernado de unu fremda lingvo uzi la akiritan scion por pli bone kompreni kaj juĝi la propran kulturon. Kaj plej grave, lernado de unu fremda lingvo povas konduki al lernado de dua, aŭ tria, aŭ kvara lingvo. Ĉiu fremda lingvo estu por la lernanto ponto al novaj lingvaj perspektivoj.

Ni do povas listigi tri celojn de la fremdlingva lernado, laŭ inversa graveco: (1) akiro de scio pri specifa kulturo aŭ kulturoj, (2) akiro de kapablo kompari tiun kulturon kun la propra, kaj (3) akiro de la kapablo lerni lingvojn entute kaj sekve elpaŝi en la eksteran mondon laŭ diversaj direktoj. Tiu lasta kapablo iras manenmane kun etiko de lingvolernado, kiu subtenas toleremon, malfermitecon kaj scivolon pri diverseco. Lingvo-instruado sen klara etika celo tiuspeca estas multe malpli facile defendebla kiel esenca elemento en la eduka sistemo de angleparolanta lando.

Mi akceptis la inviton al Harvard kaj pasigis tre interesan tagon en konversacioj kun profesoroj el diversaj fakoj pri lingvoj kaj kulturoj. Lingvoj (mi insistis) ja ne estas senmovaj objektoj, sed konstante moviĝ-antaj procedoj: ili ne estas lagoj, sed fluantaj riveroj; ili ne estas punktoj, sed retoj. Miaj alparolatoj konsentis, kiel oni povus atendi ĉe inteligentaj homoj; sed mi ne estis konvinkita, ke iliaj pedagogiaj procedoj konfirmas tiujn konstatojn. Lingvoj estas institucioj (mi klarigis) en la senco, ke ili

reprezentas historie konstruitajn interkonsentojn pri sinesprimo, kiujn la elitoj utiligas por teni siajn avantaĝojn: ili estas kaj inkludaj (por tiuj homoj, kiuj kvalifikiĝas) kaj ekskludaj (de tiuj homoj, kiuj ne konformiĝas al la normo, kiel ajn la koncerna kulturo difinas tiun normon). Ili do estas instrumentoj de potenco.

Denove la homoj konsentis, ĉar ankaŭ ili legis Pierre BOURDIEU (kiu verkis la klasikan studon pri lingvo kaj potenco). Sed kiam mi demandis, kie troviĝas tiuj pensoj en la studprogramoj de iliaj studentoj, ili konfesis, ke ili ne troviĝas tie entute. Kun tiom da kursoj pri Cervantes aŭ Lope de Vega, kaj tiom da atento al la gramatiko de la hispana, la profesoroj pri tiuj lingvoj apenaŭ havis tempon por tuŝi tiujn demandojn…. Kaj same pri la franca, la itala, la germana, la rusa, la japana – kaj tiel plue plu. "Ni ne estas sociaj sciencistoj," oni plende diris. "Jam temp' está," mi respondis, kaj komencis paroli pri mia sperto kun E-o.

Mia vidpunkto pri lingvoj (mi diris) venas grandparte el miaj Esperantaj spertoj. Kvankam oni povas konvinke argumenti, ke E-o havas sian propran kulturon, eĉ, ke ĝi praktikas socian tavoligon same kiel ĉiuj aliaj lingvoj, tamen la celo de E-o estas malfermi al la lernanto la mondon. Foje oni renkontas e-istojn, kiuj kontentas ludi en la trankviliga nesto de la Zamenhofa lingvo, sen multa perturbo pri la ekstera mondo – sed ĝenerale e-istoj estas homoj scivolemaj pri la mondo kiel tuto. Dutrakaj ŝovinistoj ili plejparte ne estas.

Mi lernis tiun lecionon kiel e-isto, sed mi ankaŭ lernis alian. Kiam Ivo LAPENNA skribis en sia libro *Retoriko*, ke la lingvo estas socia fenomeno, li eldiris evidentan veron, kiun niaj lingvoinstruistoj, almenaŭ en Usono, eĉ hodiaŭ ne plene ensorbis. Kaj li skribis tiujn vortojn kiam la tuta fako de socilingvistiko, kies deirpunkto estas tiu sama konstato, estis apenaŭ en sia infaneco. Kiam mi legis la konstatojn de Lapenna, kaj de aliaj klarvidaj lingvistoj de tiu periodo, ili ŝajnis al mi tiel evidentaj, ke ili elformis mian tutan vidpunkton pri lingvoj kaj pri la neceso ilin lerni.

Parolante pri tiu sperto kun tiuj grupoj de profesoroj kaj instruistoj, mi venis al interesa kaj fulme trafa konstato – ke E-o kondukas al kompreno pri la funkcio de lingvoj – kompreno, kiu estas pli bone adaptita al la moderna realo ol tiu kompreno pri lingvoj daŭre transdonata de tradiciaj lingvoinstruistoj al iliaj lernantoj. Lernante kaj uzante E-on, oni neeviteble vastigas sian difinon de la fenomeno lingvo, ĉar E-o rekte

alfrontas niajn tradicie ricevitajn antaŭjuĝojn pri la rolo de lingvo en socio kaj pri la genezo kaj formiĝo de lingvoj. Estus bele, se en la neesperantista mondo oni konstatus la efikecon de E-o kiel ponto al lingvolernado ĝenerale; sed mi estas realisto: tion oni ne atingos en mallonga daŭro. Aliflanke, se kompreno, ke lingvo estas socia fenomeno, estas produkto de esperantisteco, eble esperantisteco povas fariĝi produkto de tiu kompreno pri lingvo kiel socia fenomeno.

Ĉu la Universitato Harvard enkondukos devigan kurson pri lingvo kaj socio por studentoj pri lingvoj? Ĉu ĝi elbatos vojon el la tradicio lingvo-kiel-legilo-de-literaturo kaj lingvo-kiel-dutraka-elitigilo? Ĉu la studentoj frue lernos pri lingvoj kiel institucioj kaj kiel sociaj fenomenoj? Mi ne scias – sed mi ja kredas, ke tiu vizito almenaŭ levis demandojn pri la profesio kaj ties pedagogio, kiun oni tro malofte aŭdas ĉe ni en Usono. Daŭros la kampanjo!

La pedagogia valoro de kuirado

de Luiza CAROL (Israelo)

Kuirado estas tre utila metodo de instruado pri diversaj kampoj de informado, kiel ekzemple la instruado pri botaniko, pri la homa sano, pri ekologio, pri pentrado kaj laste sed ne lastarange pri lingvoj.

Jen la avantaĝoj rilatantaj al la lingva instruado pere de kuirado:

1. Pere de komuna kuirado, oni facile kapablas krei la taŭgan kadron, por pli-malpli spontana komunikado, proksima de la tute spontana komunikado en la denaska lingvo.

2. Pri manĝaĵo ĉiuj interesiĝas, sendepende de la aĝo, etna deveno, profesio ks. Tial, kuirado estas temo de komunikado taŭga por ĉiaj grupoj de lernantoj, inkluzive de grupoj kiuj arigas lernantojn el diversaj landoj, aŭ/ kaj de diversaj aĝoj ks. Tiu ĉi avantaĝo ofte gravas por esperantistaj internaciaj grupoj.

3. Pri manĝaĵo oni povas iniciati babiladon je ajna nivelo de lingvo.

a). Por komencantoj, oni povas prezenti kelkajn lingvo-strukturojn kiel ekzemple:

– Kio estas tio? – Tio estas tomato. – Kie estas la brasiko? – Ĝi estas tie, sur la tablo. – Kie estas la telero? – Ĝi estas ĉi tie, sur la ŝranko, apud la

glaso. – Kies kulero estas tio? – Ĝi estas la kulero de Mikelo. – Kiun kapsikon vi deziras? – La ruĝan.

b). Por meznivelaj lernantoj, oni povas iniciati pli malsimplajn frazojn, kiel ekzemple:

– Po kiom da kapsikoj oni enmetu en ĉiun bovlon? – Oni enmetu po unu kapsiko. – Kion oni aldonu al la salato? – Oni aldonu po unu kukumeto en ĉiun bovlon.

c). Por altnivelaj lernantoj, eblas iniciati tiuokaze babiladon pri saniga manĝado, pri ekologio ks. Ekzemple: oni aldonu migdalojn, aŭ nuksojn, aŭ kokoson al salatoj, paroligante la lernantojn pri la sanigaj proteinoj, kiuj troviĝas en tiaj bongustegaj aldonaĵoj.



Duonmelono kun fruktoj

4. Pere de specifaj manĝaĵoj, la kuirado kapablas krei la etnan etoson taŭgan por la lingvo kiun oni instruas. Ekzemple:

a). Por la instruado de la itala, oni povas aldoni boligitajn makaroniojn al la salato.

b). Por krei taŭgan etoson dum la instruado de la angla, oni povas prepari teon kun kuketoj.

c). Dum la instruado de la franca, oni povas aldoni freŝbakitajn kaŝtanojn al la salato.

ĉ). Kaj kio pri la etna etoso de E-o? Ĉu la instruistoj pri E-o ne kapablas profiti de tia avantaĵo? Male. Kiam oni instruas E-on, oni povas elekti ajnan etnan etoson por tiu tago. Tiuokaze, oni povas iom babili pri la bela UK en kiu la instruisto partoprenis, aŭ pri la venonta UK en kiu parto el la lernantoj eble partoprenos. Oni povas eĉ kuiri laŭ kelkaj etnaj tradicioj dum la sama leciono. Tiel oni kutimigas la lernantojn al la internacia etoso esperantista.

Kiuj manĝaĵoj plej taŭgas por la lecionoj?

Mi opinias, ke freŝaj salatoj estas plej taŭgaj por instruado, ĉar ili ne postulas kuirilon kaj ili estas ĉiam sanigaj (se la ingrediencojn oni bone purigas, kompreneble). Se oni povas uzi bonan grandan premilon, tiam oni povas facile prepari ankaŭ bongustajn freŝajn malvarmajn supojn, miksante sukojn de freŝaj legomoj (karotoj, celerioj, tomatoj, kukumoj, blankaj kaj ruĝaj brasikoj ktp.), al kiuj oni aldonas malvarman aŭ varman mento-teon kaj biskvitojn aŭ pecetojn de pano. (La mento-teon oni aldonas kaj por ĝia bona odoro, kaj por ke la miksaĵo ne fariĝu malsaniga). Per premilo oni povas prepari ankaŭ bongustajn trinkaĵojn el fruktoj, kun aŭ sen mielo, al kiuj oni povas aldoni sanigan teon kaj kokos-lakton. Dum tiaj lecionoj, oni povas prepari ankaŭ peklaĵojn de legomoj aŭ fungoj, sed ili havas la malavantaĵon, ke oni ne povas tuj gustumi ilin. Principe, oni preferu manĝaĵojn kiujn oni povas tuj manĝi kune, ĉar ĝui la komunan manĝon estas kaj agrabla evento, kaj taŭga okazo por babili Esperante en amika etoso.

De teorio al praktiko: analizo de poeziaĵo

de Svetlana MIROŜNIĈENKO (Sankt-Peterburgo, Rusio)

Por analizo de poeziaĵoj mi ofte uzas poezion de Julio Baghy kiu estas simpla por ĝin kompreni kaj tre harmonia laŭ ritmo. La laboro kun poeziaĵoj permesas konatigi gelernantojn kun kreado de poetoj-

esperantistoj, kiu jam iĝis parto de la monda literaturo kaj pli interese kaj efike instrui la lingvon.

La laboro dum la leciono kun poezio estas interesa sed malfacila. Mi volus proponi unu el la metodoj de tiu analizo, kiu povas helpi al instruistoj en ĉiuj etapoj de la instruado de la lingvo. Por analizi poeziaĵon oni nepre devas atenti al la aĝo de la studantoj kaj elekti la materialon depende de la interesoj de tiu, al kiu oni instruas.

Laŭ mi la poeziaĵo havas tri flankojn kiuj estas tre gravaj por ne nur kompreni la poeziaĵon sed ankaŭ ĝin interpreti: leksika kaj gramatika; informa; stila. Oni konsideras la poeziaĵon kiel komunikaĵon. Ĝi estas komuniko, kiu realiĝas dank' al la lingvo inter aŭtoro kaj leganto. Unu el la partoj lernindaj de la poeziaĵo estas ĝia leksika flanko. Do devas esti proponata la laboro kun la leksiko de poemo, kiu estas tre grava por akiri kaj perfektigi la konojn de la lernantoj en Esperanto. Poeziaĵoj estas bonega materialo por riĉigi la pasivan kaj aktivan vortostokon de la lernantoj, ĉar por ili E-o estas fremda lingvo. Oni povas labori per sinonimoj kaj antonimoj. Eblas ankaŭ labori per formado de novaj vortoj, per gramatikaj fenomenoj de la poeziaĵo. Pro tio eblas inventi multnombrajn ekzercojn, modelajn frazojn kiuj estas bazataj sur la leksiko de la poeziaĵo. Tiu laboro eĉ necesas en komenca etapo de la E-studado. Kaj poeziaĵo estas interesa materialo por infanoj, kiuj vidas kiamaniere estas kreataj verkaĵoj en Esperanto. Eblas eĉ verki siajn proprajn poeziaĵojn.

La dua flanko de la poeziaĵo koncernas ĝian informan nivelon. La poeziaĵo havas titolon ordinare pri kiu la instruisto nepre atentigu, ĉar tre ofte ĝi entenas la ĝeneralan ideon de la verkaĵo, kiu donas tre gravan informon al la gelernantoj. Vortoj de la poeziaĵo kiuj ritmas estas la ĉefaj vortoj aŭ ŝlosilo-vortoj sur kiuj gelernantoj sin apogas por rakonti la enhavon de la verkaĵo. Ili transdonas la sencon de la poeziaĵo.

Al komencantoj oni povas doni la taskon rakonti la poeziaĵon per propraj vortoj. Al tiuj, kiuj posedas bone la lingvon, donu la taskon interpreti la poeziaĵon. Por tion fari la lernantoj devas trovi «inter la linioj» la implicitan informon. En poeziaĵo estas du specoj de informoj: implicita (aŭ kaŝita) kaj eksplicita (aŭ malfermita, elprenita el la kunteksto). Eksplicita informo estas komprenata tuj dank' al la leksiko kaj traduko de la poeziaĵo. Implicita informo estas ne formale esprimita aŭ aliavorte tio estas la logika informo prenita el la enhavo. Krom tio la implicita informo sugestas problemon, kiu servas kiel bazo por kompreni la sencon de la poeziaĵo. En

poeziaĵo estas detaloj, kiuj ankaŭ servas por kompreno de la teksto, pri kiuj pro tio oni atentigu ilin. Atentigu pri detaloj eĉ tre malgrandaj en la teksto. Oni analizas la tekston ekde la detalo al la ĝenerala senco de la enhavo, de parto al la tuto, aŭ de la tuto al la parto. Oni laboras kvazaŭ en rondo. Du informoj, pri kiuj temis, helpas al interpretado de la verkaĵo. Oni devas certe konsideri la emocian flankon kiu tre influas la interpretadon de la verkaĵo precipe fare de plenkreskuloj kaj junuloj de 18-25-jaraĝaj, ĉar ili havas siajn impresojn kaj siajn rilatojn al la evento de la poeziaĵo. La humoro ricevita post la legado de la teksto respegulas la emociojn de la leganto, esprimitajn helpe de la leksiko. La leksiko kreas humoron, emociojn: melankolian, gajan, akran, mildan ktp. Al poeziaĵo apartenas propra ritmo de kiu dependas la harmonio de la verkaĵo. Estas tre grave paroli pri stilaj iloj uzeblaj por karakterizi la poeziaĵon. La metaforo ludas tre grandan rolon en poetika stilo kaj donas figuran sencon al multaj vortoj aŭ eĉ frazoj. Ĝi fariĝas unu el la iloj, kiuj aldonas implicitan informon al la teksto, laŭ mi.

Al via atento mi proponas la laboron per unu el la verkaĵoj de BAGHY kiam, por malkovri la flankojn pri kiuj mi skribis supre, oni uzas demandojn. Respondoj donos materialon por rekonstrui la tuton de la poeziaĵo kaj helpas al ĝia interpretado.

Ĉe fenestro de vagonaro

Vilaĝeto ĉe rivero
Verda monto
Flora bord'
Sonoril-son' de l' vespero
Benko ĉe la domo pord'
Ligas min al vi memoro:
Gaja ludo de infan'
La sekret' de juna koro,
Kiso de l' unua am'...
Vilaĝeto ĉe rivero,
Vin revidi vanas rev'
Tenas min en mallibero,
Urba vivo, zorgoj, dev' .



El: *Aŭtuna foliaro*, Julio BAGHY
(Surfote: La tomboŝtono de geedzoj Baghy en Kerepesi-tombejo, Budapest)

Demandaro:

1. Kiu estas la aŭtoro de la verkaĵo?
2. Kiu estas la titolo de la poeziaĵo?
3. Kion signifas laŭ vi la titolo de la poezia kolekto? Ĉu vi kredas, ke la titolo havas metaforan signifon? Argumentu.
4. Kie okazas la ago de la verkaĵo?
5. Kiel vi imagas la personon? Bonvolu priskribi lin: fizika kaj morala portreto. Diru lian aĝon.
6. Ĉu la verkaĵo estas gaja? Trovu pruvojn.
7. Parolu pri la infaneco de la heroo. Ĉu li ŝatas ĝin?
8. Parolu pri la nuna vivo de la ĉefrolulo. Ĉu li estas feliĉa? Trovu pruvojn.
9. Ĉu li estas fidela al sia infaneco?
10. Imagu lian vivon kaj parolu pri ĝi.
11. Atentu pri la foresto de la artikolo antaŭ multaj vortoj de la poeziaĵo. Klarigu tion.
12. Ĉu la protagonisto memoras pri la loko kie li naskiĝis? Pruvu.
13. Ĉu vi povas anticipi la finon de tiu ĉi verkaĵo?
14. Kia estas la homo pri kiu parolas la aŭtoro en la poeziaĵo: ĉu perfida, feliĉa, malfeliĉa? Argumentu.
15. Laŭ vi, kion simbolas la trajno en la verkaĵo?

Jen tiamaniere oni povas labori kun literaturaj E-verkaĵoj. Tio permesas paroligi la lernantojn, disvolvi la menson, evoluigi praktikon. Ĉio tio donas eblecon progresi en studado de la fremda lingvo.

Literaturo

1. Enciklopedio de Esperanto. Hungara E-Asocio. Budapest, 1986
2. Kolker B. Vojaĝo en Esperanto-Lando. Moskvo, Progress, Junior, 1992
3. Galskova N.D., Gez N.I. Teorija obuchenija inostrannim jazikam. Lingvodidaktika i metodika. M., AKADEMIA, 2004

Claude Piron mortis. Vivu la bona lingvo!

Recenzo pri la Oportuna Poŝvortaro E-Portugala de Sylla CHAVES

Mi ne povus komenci ĉi tiun recenzon per io pli bela ol simpla kopiado de la vortoj de Sylla en unu el la komencaj paĝoj: "Mi dediĉas tiun ĉi vortaron al Claude PIRON kaj al ĉiuj aliaj, kiuj klopodis, ke E-o restu la bona lingvo kreita de Zamenhof, sane kreskanta, akompananta la kompleksiĝon de la mondo kaj gardanta siajn denaskajn simplecon kaj flekseblecon, por ke ĝi meritu fariĝi la pontolingvo de ĉiuj popoloj de la Tria Jarmilo."

La fakto estas, ke mi mem konsentas preskaŭ pri ĉiuj principoj deklaritaj de Sylla en la enkonduko, kaj pro tio mi pli laŭdas ol kritikas.

Mi konsentas pri tio, ke en ĉiuj vortaroj por esperantistoj devas esti ĉiuj vortoj el la Fundamento kaj ĉiuj vortoj oficialigitaj de la Akademio. Ĉio cetera, finfine, estas nur proponoj.

Mi konsentas, ke en nia lingvo de ĉiam estis plurformaj vortoj (sinonimoj) kaj plursignifaj vortoj (homonimoj). Tiucele rigardu tion, kion Sylla faris en sia vortaro pri la vorto Atlaso/atlaso. Vi trovos: atlaso 1. (=karto, landkartaro), atlaso 2. (=sateno), Atlaso 3. (= Atlanto). Ĝis nun mi ne vidis ion similan en iu ajn vortaro. Laŭdon al Sylla, kiu komencis bonan praktikon.

Mi konsentas pri tio, ke eĉ inter la oficialigitaj vortoj troviĝas tiuj, kiuj bezonas pli simplan esprimadon. Vidu ĉe rimorso, kie vi trovos la proponatan pent-sufero. Same oni povas diri pri forigo de kelkaj plursignifaj vortoj: koreo (en medicina senco) = ĥoreo.

Kompreneble la plej multaj atakoj al la vorttrezoro de E-o estis ĉiam pravigitaj per la unua parto de la regulo 15-a de la Fundamento: rajto uzi internacie uzatajn vortojn. Sylla estas unu el la malmultaj esperantistoj, kiuj legis ankaŭ la duan parton de la regulo 15-a, kiu diras, ke oni prenu nur unu radikon kaj poste traktu ĝin laŭ la reguloj de E-o. Sylla tute kohere proponas: redaktoro (= redaktisto) kaj korektas la faron de la Akademio, kiu oficialigis en momento de ebrio la vorton tragika (= tragedia).

Mi konsentas, ke E-o estas kunmeta lingvo. Tio estas ĝia forto. Pri tio Sylla atentigas, ke prefere al hipodromo oni diru ĉevalkurejo. La recenzata vortaro estas minejo de tiaj proponoj. Se vi ne volas paroli la grekan, aĉetu ĉi tiun vortaron.

Mi konsentas, ke por normala parolanto la subtilaj distingoj de botanikistoj kaj ĥemiistoj estas tute neinteresaj. Mi volas manĝi pomojn kaj ne volas scii pri la malsamecoj inter la ruĝaj pomoj kaj la blankaj pomoj, kiuj havas aliajn nomojn por la botanikisto. Mi fieras pri mia malfakeco preskaŭ pri ĉio, ĉar tiaj estas la normalaj parolantoj de lingvo.

Mi konsentas pri la pritraktado de la nomoj kaj homaj kaj geografiaj. Oni devas kaj simpligi kaj obei la regulojn de E-o. Mi nur ne samopinias pri la uzado de la formoj en -io de la landnomoj. Mi daŭre diras Italujo, kaj Italio restas por mi io fremda al E-o. En alia okazo ni povus debati kial. Aliflanke mi agnoskas, ke Sylla skribis: "Se o leitor preferir dizer Italujo e Polujo, em vez de Italio e Pollando . . .que o faça." (= Se la leganto preferas diri Italujo kaj Polujo... li faru tion).

Mi akceptas lian inviton pri tio. Sed preter la unuopaj punktoj, mi konsentas ĝenerale pri la strebo de Sylla teni E-on simpla kaj por normalaj homoj. Tiu estis ankaŭ la strebo de Claude PIRON, al kies ideoj mi mem dediĉis la paĝaron http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj. Post la forpaso de Piron, Sylla restas grandulo al kiu mi rigardas por ricevi inspiron. *Renato CORSETTI*

Taksu objektive viajn lingvokonojn

de Katalin KOVÁTS (Nederlando/Hungario)

En la sekvaj du paĝoj ni publikigas gravan dokumenton de la resuma verko *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*[1].

La lingva memtaksilo ebligas al la lingvolernantoj objektive taksi sian lingvonivelon kaj konscie plani sian pluan progreson cele al la pli bona alproprigo de la lingvo. La saman taksosistemon kaj la difinon de la niveloj, kiel modelon, pli kaj pli da lingvolernejoj kaj eldonejoj de lerniloj uzas jam dise en la mondo kaj ĝin klopodas transpreni ankaŭ ni en la E-movado. Por forigi la subjektivan komprenon pri la vortoj kiel ekzemple 'komencinto' aŭ 'progresanto' ni proponas ekde nun uzi *(→ p. 24)*

[1] Verkisto: Konsilio de Eŭropo – HAVEMAN, Roel (trad.). Eldonejo: UEA, Rotterdam, 2007. ISBN: 978 92 9017 100 3. 262 p. (ĉe UEA: € 27)

En la reta varianto vidu la memtaksilon post la lasta kovrilpaĝo!

nur la 6-ŝtupan sistemon de la Referenckadro. Ni, E-instruistoj kaj verkantoj de lerniloj klopodas klasifiki niajn lernomaterialojn, ekzercojn kaj lernilojn, anoncatajn kursojn tiel, ke ili klare indiku kiunivelan lernanton ili celas. Ĉe lernolibroj – kiel ankaŭ en aliaj lingvoj – ni videble indiku de kiu nivelo ĝis kiu nivelo tiuj provizas la lernontojn de la libro per materialo.

Ankaŭ la novtipa ekzamensistemo de UEA kaj ITK (Hungara ŝtata lingvoekzamena centro) baziĝas sur la sama principaro, ĝia modelo de E-ekzameno estas akreditigita de ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo). La nova sistemo, lanĉita komence de 2009, proponas ekzameniĝeblojn sur tri el la ses niveloj, nome sur B1, B2 kaj C1. En la UK en Bialistoko okazos jam la 4a sesio. Ni invitas la kolegojn trapasi kaj sperti ĝin, por poste povi bone prepari kandidatojn por tiu ekzamentipo.



Pri la novtipa ekzameno de UEA-ITK, pri ĝia priskribo, postularo kaj sesioj troveblas pliaj informoj sur la paĝaro *www.edukado.net* kaj aĉeteblas ampleksa eldonaĵo *Esperanto de nivelo al nivelo*[2] kune kun specimenserioj sur ĉiu nivelo. Ekde la dua parto de la jaro 2009 eblos ankaŭ rete taksi la lingvonivelon trapasante provekzamenon kun la celo trovi kiunivele valoras aliĝi al ekzameno. Tiun retan sistemon funkciigos la hungara ekzamencentro ITK, kunlabore kun *www.edudako.net* kaj la ekzamena komisiono de UEA.

Komencu la moderniĝon per trastudo de la memtaksilo, difino de via nivelo kaj al la samo instigu viajn lernantojn kaj kolegojn.
Ĝis revido dum unu el la ekzamensesioj de la novtipaj ekzamenoj.

Katalin KOVÁTS,
redaktanto de www.edukado.net,
kunordiganto de la ekzamenkomisiono de UEA

[2] Subtitolo: Lingva ekzameno Origo. Verkistoj: KÓRÓDY, Zs. – KOVÁCS, M. – SALOMONNÉ CSÍSZÁR, P. - SZABÓ, L. Eldonejo: Idegennyelvi Továbbképző Központ, Budapest, 2008. 136 p. (ĉe UEA: € 10.50)

Unua leciono de la galega lingvo per rekta metodo

de Xosé CONDE (Hispanio, xoconde@yahoo.es)

Dum seminario por E-instruistoj gvidata de Irina GONĈAROVÁ kaj okazanta dum Ago-Semajno en Liptovský Mikulaš inter la fino de 2008 kaj la komenco de 2009, mi estis invitita de Irina prezenti ion utilan al la estontaj instruistoj. Post iom da pripensado mi decidis fari la unuan lecionon de la galega lingvo. Mi celis, ke la lernantoj sentu en sia propra interno, kion sentas ĝenerale lernantoj de eksterlanda lingvo dum la unua leciono per rekta metodo. La eksperimento daŭris ĉirkaŭ duonhoron. Antaŭ la komenco mi demandis Esperante ĉu iu konas iun latinidan lingvon kaj neniu respondis. Des pli bone por la eksperimento ĉar tiel mi certis pri ilia absoluta nekompreno de la lingvo instruota. Mi ankaŭ disdonis al ili kelkajn demandojn, por ke ili pripensu pri tiuj temoj dum la leciono. La demandoj estis tiuj ĉi:

Pri la enhavo:

1. Ĉu oni instruis (ne) taŭgajn vortojn aŭ gramatikerojn?

Pri la instrulingvo:

2. Por kio taŭgas uzi la cel-lingvon?
3. Por kio taŭgas uzi la lernanto-lingvon?

Pri la instru-teknikoj:

4. Kio plej taŭgas por doni instrukciojn al la lernantoj?
5. Por kio taŭgas prononci laŭtvoĉe antaŭ ol povi legi la frazojn?

Pri la dinamiko:

6. Por kio taŭgas komuna / individua ripetado?

Ĝenerale:

7. Kio ne funkciis?

Dum la unuaj 15 minutoj mi instruis kelkajn frazojn en la galega kaj la konjugacion de la verbo nomiĝi, kaj dum la lastaj 15 minutoj ni ĉiuj kune pripensis pri ĉio okazinta. Mi intence ne instruis bone, speciale dum la unuaj minutoj. Mi klopodis fari kelkajn tipajn erarojn de la junaj instruistoj: tro da klarigoj kiuj certe ne estas kompreneblaj por la lernantoj, demandi homojn kiuj absolute ne scias kion respondi, ĉar la instruisto ne donis al ili la rimedojn por respondi, instrui malofte uzatajn vortojn aŭ gramatikerojn, ktp. Poste mi plibonigis la sistemon: ni ripetis koruse kelkajn tre simplajn frazojn (Saluton, kiel vi fartas?, kaj tiel plu), tute kompreneblajn el la kunteksto, kaj poste ili ripetis ilin en paroj. Nur post tio mi skribis la

frazojn sur la tabulon kaj praktikis ankoraŭ pli da tempo. Sekve mi prezentis la konjugacion por ĉiuj personoj de la verbo “nomiĝi” en prezenco, kaj finis praktikante denove la frazojn lernitajn.

La plej interesa parto fakte estis la dua, kiam la lernantoj kaj mi komentis ĉion kio okazis. Unue ili sentis sin perditaj sed iom post iom sufiĉe komprenis. Oni kritikis la neutilecon de la as-tempa konjugacio de la verbo “nomiĝi”. Oni proponis prezenti nur la du unuajn personojn (la plej uzatajn) aŭ la verbon “esti” anstataŭ “nomiĝi”, ĉar tiu estas multe pli utila por novaj lernantoj. Oni taksis ankaŭ, ke la uzado de la cel-lingvo taŭgas por “kutimigi la orelon” al la nova lingvo kaj por disvolvi ene de si mem strategiojn por kompreni la instruiston. Tamen, ankaŭ povas esti utile uzi la lernanto-lingvon por ekzemple klarigi ion komplikan, aŭ tutsimple por lasi la lernantojn ripozi. Pri la instrukcioj oni konkludis, ke la klarigoj en la cel-lingvo preskaŭ ne taŭgas, ĉar la lernantoj ne povas kompreni ilin, sed jes taŭgas fari ekzemplon aŭ klarigi en la lingvo de la lernantoj.

La ripetado antaŭ la legado de la frazoj taŭgis por fiksi la prononcon sen pripensi la manieron skribi la literojn, kaj por parkerigi kelkajn utilajn frazojn. Fine, ripeti unue koruse utilas speciale al la lernantoj kiuj ankoraŭ ne sentas sin sufiĉe certaj pri la prononcado. Poste dum la perpara ripetado ili fiksas la frazojn en sia menso. La lernantoj memoris pri la frazoj eĉ tri tagojn poste!

Entute estis laŭ mia vidpunkto tre interesa eksperimento. Kelkfoje okazas, ke abundaj teoriaj klarigoj pri metodologio ne helpas kompreni, ĉar oni devas ellabori la tutan argumenton ene de la kapo kaj imagi ĉu tio funkcius aŭ ne. Sed sperti (kaj suferi!) kiel nova lernanto kelkajn teknikojn kaj poste pripensi pri ilia utileco dum niaj kursoj, tio ja estas vere lumiga.

Ĉu lingvo dum 7 tagoj estas miraklo?

de **Gennadij ŜILO**, *la rektoro de Eŭropa universitato JUSTO*

Praktiko estas kriterio de la vero de ajna teoriaĵo. Tial ne maloftas la kazoj, kiam la scienco klarigas mirindajn faktojn jam okazintajn en la praktiko. Tiujn faktojn oni fojfoje nomas mirakloj. Sed mirakloj, kiel sciatas, ne ekzistas. Ordinare oni nomas miraklo naturan aŭ socian fenomenon, kiu dume ne estas klarigita science.

Verŝajne, al la speco de tiuj mirakloj en la sfero de socia (kleriga) agado necesas atribui la statistikan fakton menciitan de prof. *SELTEN*, karakterizantan studadon en Germanio de fremda lingvo laŭ la 4-jara programo. Kiam en paralelaj klasoj oni „perdas" 2 jarojn por studado de la Internacia Lingvo Esperanto, tiuj lernantoj dum tiu tempo ekposedas ĝin perfekte, kaj dum la restintaj 2 jaroj sukcesas ekparoli fremdan lingvon pli bone, ol tiuj, kiuj dum ĉiuj 4 jaroj studis nur la fremdan.

La esploroj montris, ke 94-96% de tiuj, kiujn oni kutime konsideras posedantoj de fremdaj lingvoj, efektive ne posedas tiujn lingvojn kaj kapablas interkomunikiĝi per fremda lingvo nur sur primitiva nivelo.

Mezkapabla studento dum 2 jaroj povas finstudi E-on pli bone, ol la gepatran lingvon, kiun li studis dum 15-20 jaroj ĝis tiu tempo. Tiu ĉi konkludo ne estas ŝerco, se konsideri, ekzemple, ke en la rusa lingvo ne estas sciate, kio pli multas – ĉu la reguloj aŭ la esceptoj de ili, sed en E-o, havanta la gramatikon sur 2 paperfolioj, ne estas eĉ unu escepto. Mi studis E-on ne tiel diligente, kiel la rusan lingvon, kaj ne tiom longe. E-on dum 4 monatoj, la rusan dum 64 jaroj. Mi parolas kaj skribas en E-o senerare (ĉi tie - kiel oni skribas, samtiel oni legas). En la gepatra rusa lingvo mi ĝis nun ne povas kompetentiĝi. Mi celas, ke konsiderata kiel deca scianto de la rusa lingvo, kiun mi studas jam la 65-an jaron, tamen mi pli malanalfabete parolas kaj skribas en E-o, kiun siatempe mi studis dum 4 monatoj.

En la informlibro „La plej bonaj finintoj de la moskvaj superaj lernejoj en 2004" (p. 37-38) estas priskribita la unika kazo en la rusia pedagogia praktiko, kiam la grupo de la finintoj de la ĉeesta fako de la fakultato de la Eŭropa universitato JUSTO plenumis diplomhavigajn ekzamenojn kaj defendis diplomtaskojn antaŭ la ŝtata komisiono en 3 lingvoj – la rusa, la angla kaj E-o. Dum 9 jaroj en la universitato, kie E-o estas deviga studobjekto, tiu lingvo estis studata dum 10 tagoj, sed dum la lastaj 2 jaroj po 7 tagojn (po 6 studhorojn ĉiutage). En la 8-a tago la grupo ekzameniĝas ĉe la komisiono, en kiu estas 3 sciencistoj- esperantistoj. La ekzameno konsistas el 5 partoj: 1) prezento de spektaklo „Atenco" pri ekonomi-jura temo. La spektaklo daŭras de 1 horo ĝis 2,5 horoj depende de la grandeco de la grupo; 2) voĉlegado de poemoj aŭ rakontoj, ŝercoj, skeĉoj, anekdotoj; 3) korusa prezentado de kantoj; 4) gramatiko; 5) konversacio kun la ekzamenantoj ne nur pri ĉiutagaj temoj, sed ankaŭ respondoj al demandoj similaj al: „Kiujn funkciojn plenumas advokato?" „Kiu estas la akuzanto en kriminala juĝproceso?" „Kiu estas la centra

figuro en kriminala juĝproceso?" „La rolo de la prezidanto en juĝproceso" ktp.

Iu ne kredas: ia miraklo estas. Sed ĉiujare la procedo de la ekzameniĝo fiksiĝas per videoregistrilo. Neniu miraklo okazas. Sciatas, ke pli bone studi lingvon estas voĉlegi parkerigatan prozon, poemojn, kanti, demonstri realaĵojn ludante. La menciitan gramatikon la studentoj studas en la unua tago. Ĝis la fino de la tago la studentoj plektas tiajn frazojn, kiajn plejmulto el ili ne finlernis konstrui dum 5-10 jaroj da lernado de alia lingvo. Kaj la afero ĉi tie estas ne nur en gramatiko simpla kaj logika, sen ajnaj esceptoj, sed ankaŭ en tio, ke en E-o ĉ. 50 %-oj de la terminoj estas vortoj de internacia uzado, konataj al ajna mezerudicia homo, kiel: profesoro, akto, aktiva, programo, plani, aktuale... Tial ĉiu komencinta studi E-on fakte jam duone konas ĝin. Laŭ la metodiko, ellaborita en la Eŭropa universitato JUSTO, ne necesas studi ĝin dum 2 jaroj, kiel en la ekzemplo de *SELTEN* el la germana praktiko.

La 7-taga kurso de studado de E-o komenciĝas ĵaŭde. Tiutage la tuta gramatiko donatas. Vendrede la studentoj alproprigas la aplikadon de la gramatikaj reguloj praktike. Samtage legatas la spektaklo kaj distribuatas la roloj, disdonatas la tekstoj de la poemoj, kantoj, rakontoj ktp. Dum ĵaŭdo-vendredo la studentoj ne sukcesas laciĝi pro la nova fako. Eĉ pli, la entuziasmo pro la konvinkiĝo, ke nur post 2 tagoj ili jam povas relative facile paroli per tiu lingvo, instigas ilin en la venonta semajnfino kun plezuro plenumi la taskojn de la unuaj 2 lecionoj, kun kiuj ili jam konatiĝis. Ekde lundo la ritmo de la laboro jenas: dum 3 horoj parola praktiko, dum la 3 restintaj horoj lernado de la roloj, kontrolo de la ĝusteco de la prononco, ellaboro de la parolmaniero kaj de la fundamento de la retoriko. Ĝuste tiel la tutan sekvan semajnon ĝisvendrede. Kompreneble ankaŭ hejme la studentoj devas studi, kiel necesas, dum tiom da horoj ĉiutage, samkiom ili studas en la universitato. La sekvan lundon (en la 8-a labortago) 3 horoj da ĝenerala provludo kaj la menciita ekzameniĝo.

Universitato JUSTO kun Rusia E-Unio preparis liston, en kiu estas pli ol 200 e-istoj (el la plej grandaj urboj de Rusio), havantaj konvenan sperton pri instruado de E-o. Tiuj homoj pretas neprofiteme efektivigi semajnan kurson de instruado pri la bazo de E-o por instruistoj de lernejoj kaj altlernejoj laŭ la menciita aŭ alia metodiko (kiuj sufiĉe multas en Rusio). Post tiu kurso la instruistoj mem instruos jam kontraŭ pago en lernejoj kaj altlernejoj.

Ni rimarku, ke e-istoj estas la sola kategorio el la komunumoj, en ĉiuj el kiuj 100 %-oj de la anoj posedas minimume 2 lingvojn. Tial ilia opinio rilate al la solvo de la lingva problemo estas sufiĉe kvalifikita kaj meritas seriozan atenton.

Kiel la sovetia, tiel ankaŭ la rusia skolo de la instruado de fremdaj lingvoj kun grandegaj monaj kaj tempaj elspezoj ne atingis la deziratan rezulton, nur unuopaj studantoj povis ekposedi lingvon. Necesas radikale ŝanĝi la aliron al la instruado! Kiel? Profesoro *SELTEN* donis la ekzemplon al ni kontraŭ la sama tempo kaj kontraŭ la sama mono studi 2 lingvojn anstataŭ 1.

Akomodante al la rusia sistemo de la instruado de lingvo, kie la ŝtata normo antaŭvidas studadon de fremda lingvo dum 3 jaroj (dum 340 horoj), eblas imagi sufiĉa unu jaron destini por studado de E-o, kaj la du restintajn por fremda lingvo.

Ankoraŭ unu ekzemplo el eksterlanda praktiko de studado de fremdaj lingvoj meritas atenton. Oni enkondukis E-on en Hungario antaŭ multaj jaroj, kiel fakultativan studobjekton, en la studprogramojn de la lernejoj kaj altlernejoj. Unu jaron post la enkonduko, la kvanto de la studantoj de tiu lingvo kreskis plurdekoble kaj, sekve, pliboniĝis la posedo de la fremdaj lingvoj. Hodiaŭ la posedo de la lingvo E-o en Hungario donas la samajn avantaĝojn, kiel de ajna fremda lingvo: pluson de 15%-oj al la salajro pro ĉiu lingvo[3]. Mi ne povas juĝi, kiom tio movis antaŭen la lingvosciadon, sed ŝajnas esti nekontesteble, ke tiom efika stimulo por ekposedo de lingvoj kontribuas al tio, ke hodiaŭ Hungario iĝas la avangardo laŭ la kvanto de la nobelpremiitoj averaĝe por la kvanto de la enloĝantoj.

Ni, rusianoj, esence bezonas inventi nenion, sed simple uzi la bonan ekzemplon de aliuloj kaj ŝanĝi nian rilaton al la lingva problemo. Kaj se tia regno kiel Rusio, kun konsidero de ĉiuj menciitaj kaj nemenciitaj argumentoj, per vola ago enkondukos E-on kiel propedeŭtikan rimedon en la studprogramojn, mi opinias, ke sekvos ĉenreakcio de ŝtatoj. Kaj tiam ne malantaŭ montoj estos la tempo, kiam realiĝos la multjarcenta revo de la homaro pri la solvo de la problemo de la internacia komunikado danke al ankaŭ neŭtrala helpa lingvo. Pli racia rimedo hodiaŭ ne ekzistas en la mondo kaj en la plej proksimaj 50-100 jaroj ne antaŭvideblas, se konsideri,

[3] Teorie, laŭleĝe jes. Sed mi ne konas kolegon, kiu ricevis salajroaltigon pro lingvoekzamenoj. Ĉio dependas de la lokaj eblecoj. – NdlR

ke dum la lastaj 2000 jaroj estis entreprenitaj ĉ. 3000 provoj krei tuthomaran helpan lingvon, kaj tion partoprenis tiaj geniuloj, kiel Dekarto, Spinozo, Lejbnico, Ejnŝtejno kaj multaj aliaj. Ja restis viva kaj sukcese funkcias el ĉiuj racie kreitaj lingvoprojektoj nur 1: E-o.

„Laŭ la esprimivaj kapabloj kun la lingvo E-o ne povas egaliĝi iu el la naciaj lingvoj, kiujn mi posedas", deklaris la fama lingvisto *Paul ARISTE* el Tartu, kiu posedis kelkdekojn da lingvoj kaj ankaŭ E-on.

tradukis el la rusa Vladimir MININ laŭ la peto de Claude PIRON
(laŭ artikolo aperinta en "e-ins" 12 januaro 2008)

Erarologio

De PoVo al PIVo

rubriko de Rob MOERBEEK (Nederlando)

Rilate la antaŭan rubrikon: S-ano J. SCHIFFER evidente pravis: mi (vin)tro-dormis kaj mi dankas pro la korektoj.

Ĉe la verboj ni emas pretervidi la diferencojn inter E-o kaj la nacia aŭ rega lingvo ankaŭ pri la signifoamplekso, la "rekcio" (transitiva/ netransitiva) kaj la "voĉoj" (i/igi/iĝi). Ĝenerale verbigo de substantiva radiko eblas rekte: "sukeri la supon" lingve ne meritas riproĉon. Sed surbaze de adjektiva radiko verbigo pleje bezonas –ig: lingve ne bongustas *"dolĉi la supon".

Foje mistifikas nin paronimeco ("stoki" sub influo de "stakigi" misformiĝas al "stokigi").

Sed – la tria la plej bona – gravaj ŝanĝoj en PIV ("Plena Ilustrita Vortaro", 1970 … 2002, 2005) kompare kun PV ("Plena Vortaro" 4a eldono 1953 kun grava Suplemento de la sama Gaston WARINGHIEN, kiu riĉigis nin per PIV) evidente ne trovis ĝeneralan aplikon: klare pro la nedigestata amaso da novaj eroj. Nu, kio novas?

La lasta eldono (2005), kiu rezignis pri la epiteto "Nova", malhavas la ikson (x) por indiki la kombinon tr(ansitiva)/netr(ansitiva), sed foje ankoraŭ allasas "tr aŭ netr" (pardoni iun/ al iu), pli ofte distribuas la indikojn laŭ la signifoj (suferi I netr – kun "de", "je" kaj "pro"; II tr por la signifoj 4a kaj 5a). La plej multaj x-verboj en PIV aperas transitivaj, kio ne malhelpas (ankaŭ laŭ la antaŭparolo) al-objekton (ĉe "komandi" tr ni trovas

la Zamenhofan “al iu”), tiel ni legas (krom absoluta uzo: sen objekto) nur akuzativajn objektojn ĉe influi (ĉu tamen eblus “al iu”, “sur ion”?) kaj gratuli (mankas la ankoraŭ ofte legata “al”). Pozi (nun netr) ne plu paralelas kun “figuri” por indiki kion oni bildigas. Prave la limigo okazas kiam PV ne ekzemplis rektan objekton: interalie hurai perdis transiremon. “Enui la tutan tagon” neniel meritis la klasifikon “tr”.

Kompletan “transvalorigon” suferis la elektro-verboj: homojn oni verŝajne plu elektras (sen mortigo), tamen kiel pacienton ne plu “elektr(um)as”, sed oni moderne elektrigas sukcenon per frotado kaj kongresanojn per parolado; fervojojn ni ne plu elektrigas sed elektrizas. En la Viena UK en 1970 Prof. WARINGHIEN mem nin elektrigis per sia klarigo ke “abonantaro” montras ke anstataŭ “aboni novan gazeton” ni uzu “ekaboni”. “Kargi” ŝanĝis sian signifon “ĉarti” al “ŝarĝi”. Sed eĉ nun ankoraŭ niajn poetojn ne trafis la radikkaraktera ŝanĝo de APERT: ĝi estas (laŭ la freŝdata PIV) adjektiva. Do aperti ne plu signifas malfermi…. (Poetoj ja ĝuas licencojn!)

Plej ofte – laŭ la principo de sufiĉo - restis la mallonga varianto el la x-verboj, tute ekonomie. Do ne plu breĉ(et)igi, bukligi, centrigi (krom kiel fakvorto), ĉagreniĝo, decidiga, dentigi, falsigi (honorcite: la zamenhofa falsofari), kalkumi agron, fulgigi, enklasigi, koloniigi, komenciĝo, laŭ-liniigi (nun sen prefikso, prave restis liniita papero), magnetigi, ekmovigi (nun sen sufikso), neigi (aldoniĝis la foje necesa “negi”), nomigi (sed oni nun ja plisilabe nomumas postenulon), revoluciigi, sulkigi….

Tamen – laŭ la principo de logika neceso - ni nun aliformIGas, fragmentIGas, publikIGas, elradikIGas, versoj ne plu rimas, sed nur rimIĜas. Ordi fariĝis ARKaismo.

Novaj verboj: energii, hipnoti (NTR!) kaj hipnotIZi.

Enigma – ne ĝenerale agnoskata – estas la transitiveco de “kosti” kaj “valori”, ĉe kiuj ne eblas pasivigo (ĉu *la vivo estas kostata/valorata de tia kuraĝo”?).

Laŭ la rekomendo de Verax kaj Wüster malkiel APERT nun KONCENTR fariĝis verba: sen –ig-. Kaj ĉe la tradicia koncentra ni nun trovas la rekomendon = samcentra, do ni preferu la kunmetaĵon.

PIV 2005 diferencigas “korpigi” de “enkorpigi” kaj svati ne plu rilatas propran edziĝemon: moderne-komunlingve indas “svatiĝi”.

Feliĉe krom ARK kaj EVI(tenda) ni retrovas ankaŭ tiajn avertojn (alivorte): ne trouzi la sufikson –UM, ne uzi ĉe ekzerci kiel rektan objekton la lernaĵon. (simile oni trejnas la fingrojn, ne plonĝadon).

Bv provi: Ĉu mi abonigu al vi IPR? Ne, mi jam abon__
Aperas printempo: ni apert__u al ĝi nian animon.
Por kursanoj ni zorge artik__u niajn vortojn.
Faligante la kuleron mi breĉet__is la telerrandon: ĉu prefere ĝin dent__i?
Krispan hararon ne necesas bukl__i.
Ni devas (kon)centr__i ĉiujn niajn fortojn, ĉar venis la decid__a horo.
Fumkafejoj fals__as la konkurencon. La petrola lampo terure fulg__is.
Manke de narkotiloj mi eble hipnot__u vin, afablis la dentisto.
Ni havas nur unu tagon por klas__i ĉiujn librojn en la aŭkciejo.
Kial vi provas koloni__i nian insulon? Kompatu (al ni/nin)!
En la komenc__o estis knal__ema praatomo.
La skulptisto sukcesis (en)korp__i sian idealon kaj kontenta kruc__is la brakojn sur la b(r)usto.
Sur lini__ita papero la ludomaniulo (laŭ)lini__is siajn ĵetonojn: pli facile ol ilin stak__i, li diris.
Ĉu necesas magnet__i la metalon antaŭ ol elektr__i la malamikon? Bone, sed ne ekmov__u la aparaton! Vi pravas: tio estas nene__ebla!
Nia Esperanto-lekciisto estis nom(ig/um)ita profesoro. Hura__u (lin/al li)!
Mi riĉiĝis per or(ig/um)ita horloĝeto.
Tutan arbon la ventego elradik__is.
Ĉu asonanc__itaj versoj pli malfacilas ol rim__antaj?
Ne sulk__u la frunton, kiam vi svat__as je belulino!

Solvoj: Mi ĝin jam abonas; apertigu; artiku/artikigu; breĉetis; denti; bukli; (kon)centri, decida; falsas; fulgis; hipnotigu; klasi; kolonii, kompatu nin; komenco, knalema; korpigi, krucis – brusto; liniita, liniigis (ja eblas: laŭliniigis); stakigi; magneti (magnetigebla ŝajnas ARK en la freŝdata PIV); elektri, ekmovu; neneadebla/nenegebla/ne neigebla; nomumita, hurau al li; or(ig)ita; elradikigis; asonancitaj, rimiĝantaj; sulku, svatiĝas.

Legantoletero por IPR

Dankon pro la aperigo de la traktaĵo de Geraldo MATTOS "Ago kaj stato ĉe participo" (IPR 09/1, p.9-13). Ĝi denove instigas ankaŭ pedagogojn trapensi sian leĝeran uzadon de la Esperantaj participoj, asertante sekvon al la Zamenhofa lingvouzo kaj la aspektismaj reguloj de WARENGHIEN kaj KALOCSAY. Ne, ili ne sekvas ian sistemon, kion ja vere bezonas racia

internacia lingvo. Ili preferas sekvi la proprajn kutimojn aŭ malbonajn modelojn. Tion ne nur asertas mi malgrava germana Esperantano, sed iama prezidanto de AdE.
Se la esperantistoj tiam kaj hodiaŭ malferme trapensus la studaĵojn de Rikardo ŜULCO, ili ne ĉiam denove devus barakti kontraŭ tiu ĉi lingva demando. Ili havus la plej simplan solvon: "La participo rilatas al la priparolata tempo." Tiam nek prof. MATTOS, nek d-ro FISCHER, nek d-ro VERGARA (ties demandojn aŭ studojn mi ekzemple konas) ĉiam denove devus elpensi eliron el la aspektisma sistemo.
Se E-o estas klara, racia lingvo, multaj esperantistoj ne meritas ĝin. Sed aparte tiuj trudas tempoperdon, nekoheran lingvaĵon, eĉ malpacon al ni aliaj. Tian lingvon mi neniam volis lerni.
Sed ĉu ni vere esperu racion en racia lingvo, se eĉ tiom klera kaj ŝatinda persono kiel André CHERPILLOD en Monato kriigas (tiel!): "Mi ne estas atisto", taksante tiun atribuadon "insulto"?
Sen komenti la tutan artikolon en IPR, mi konkrete konsterniĝas, kiam mi post jardeko legas ĉe MATTOS preskaŭ la samajn vortojn, kiujn mi legis tiam ĉe Ŝulco: M. klarigas, ke la ago okazas "dum la parolo" (Ŝulco: "priparolata tempo"). Same li akcentas la paralelecon de aktivaj kaj pasivaj participoj. Kiom ofte oni devas inventi la tempisman radon, ĝis la lasta piedulo komprenas, ke nur ĝi konvene helpas atingi la celon?
Por ne plu perdi valoran tempon, mi nur povas konsili al la akademiano MATTOS kaj estontaj gramatikistoj studi la Ŝulcajn verkojn. Al pedagogoj mi rekomendas lerni kaj instrui racian interpretadon de la participoj. Kaj tiu interpretado ne estas arbitra, sed rezultas el la rekta apliko de la 6a regulo Zamenhofa.

Franz-Georg RÖSSLER (Germanio)

El la landoj kaj sekcioj

Britio – Germanio – Hungario

Esperanta Comenius-projekto financata de EU

Trilanda kunlaboro de bazlernejoj per E-o inter 2008-2010

Grandan sukceson atingis la komune ellaborita Comenius-projekto de tri bazlernejoj, kie E-o estas instruata kiel lernfaciliga studobjekto. Dum du jaroj la Springboard-lernejo en Bar Hill/Cambridge, Britio, la Nicolai-lernejo en Herzberg am Harz, Germanio, kaj Komlóstetői Általános Iskola

en Miskolc, Hungario, kunlaboras enkadre de la t.n. „Lifelong Learning Programme" de EU. Tiu ĉi Comenius-projekto „Lingvoj kaj Landoj" celas edukadon al eŭropaneco per E-o, lingvo havanta propedeŭtikan rolon por plifaciligi la lernadon de fremdaj lingvoj kaj komunikadon en Eŭropa Unio. Dank' al la persista instrulaboro, bona kunagado de Tim MORLEY, Zsófia KÓRÓDY kaj Ilona FEDOR, la infanoj el la tri partnerlernejoj interŝanĝas informojn, fotojn, filmojn, salutojn, bildojn. Ili havas komunan retan platformon, blogejon ĉe e-Twinning, kie ili prezentas siajn materialojn. La instruistoj kunagadas per video-konferencoj, la infanoj same uzas la modernajn vojojn de rekta komunikado per la interreto: estas granda travivaĵo vidi, aŭdi unu la alian. La gajnita subvencio ebligas la aĉetadon de la bezonataj materialoj, teknikaĵoj por efika E-instruado, kaj pagos la kostojn de reciprokaj vizitoj unu al la aliaj en la sekvaj du jaroj.
La preparvizito de lerneja grupo, 7-9 jaraj infanoj kun gepatroj kaj instruistoj, okazis en aŭgusto 2008 en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo. La sekva evento estos vizito al Britio fine de aprilo.

Germanio

TORPEDo-5 en Herzberg am Harz

AGEI, landa sekcio de ILEI en Germanio, invitas interesiĝantojn el Germanio kaj el la tuta mondo al sia tradicia Oktobra Pedagogia Renkontiĝo, organizata de Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana E-Centro por 9-12 oktobro 2009.
CELO: prezenti varion de instrumetodoj, montri ilin en praktiko; ekkoni historiajn kaj nuntempajn lernmaterialon, renkontiĝi kun aŭtoroj, metodikistoj
TEORIO KAJ PRAKTIKO: Lernu pri instrumetodoj, ekkonu la plej gravajn lernolibrojn, renkontu fakulojn, havu rektan spertinterŝanĝon. Tiu kunveno estos grava kaj por spertaj instruistoj kaj por tiuj, kiuj ŝatus ekkoni pli pri efika instruado de E-o. Biblioteko kun abundo da faka materialo surloke je dispono!
JUBILEA PROGRAMO:
• prezentado de tradiciaj kaj modernaj lernolibroj, instrumaterialoj, instruteknikoj, spertinterŝanĝo, diskutoj
• instruista bazaro. Aŭkcio de valoraj malnovaj lernolibroj

• filmoj, registritaj modellecionoj, analizo de la montritaj metodoj kun helpo de spertuloj, memorprogramoj honore al tiuj, kiuj jam ne povas esti inter ni. Renkontu ilin per filmoj, voĉregistraĵoj
• metodiko en la praktiko: provinstruado
• inaŭguro de pedagogia-metodika fakbiblioteko en Interkultura Centro Herzberg: gazetoj, faklibroj, lernolibroj, instruhelpiloj, son- kaj vidmaterialoj, vortaroj ktp.
INVITOTOJ: aŭtoroj de lernolibroj, faklibroj pri E-instruado, ekkono de diversstilaj libroj kune kun la taŭga metodo, informoj, prezentadoj, el la unua mano', t.e. de la aŭtoro mem!

Kontakto: *Zsófia KÓRÓDY, prezidanto de AGEI,*
DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. +49/5521-5983,
http://ic-herzberg.de, zsofia.korody@esperanto.de

Hungario

En Hungario estas preferataj la lingvoj lovara[4] kaj Esperanta.

En Hungario en universitatoj kaj altlernejoj ekde dek jaroj iĝis mode elekti E-on kaj la lovaran. La studentoj ĝenerale decidas tion prokomforte, ĉar por akiri diplomon oni bezonas iun lingvoatestilon kaj por multaj ŝajnas pli facile akiri ĝin ĉi-maniere, uzante malpli da energio en la studado.

Por studentoj estas alloga la simpla gramatiko de E-o kaj la vorttrezoro de la lovara, pri kiu oni pensas, ke ĝi havas malpli multajn vortojn ol aliaj lingvoj. (Se tio estus vera, eĉ tiam tio ne faciligus la studadon, ĉar por akiri iun ajn lingvoatestilon oni bezonas ĉ. dumil-dumil kvincent vortojn el iu ajn lingvo en mezgrada lingvoekzameno.)
La populareco de ĉi tiuj du lingvoj stagnis dum la lastaj jaroj: lastjare metis sukcesan lingvoekzamenon pri E-o 2% de la studentoj, pri la lovara: 1%. La plejmulto el la studentoj daŭre plej ofte preferas la anglan kaj germanan lingvojn al aliaj lingvoj.

[4] NdlR: Romaoj parolantaj la lovaran lingvon aŭ proksiman dialekton vivas plejparte en Rumanujo, Slovakujo, Hungarujo, Balkanio (Serbujo, Kroatujo ktp), Francujo, Germanujo, Nord-Ameriko. La diversaj ciganaj lingvoj traretas tre grandan teritorion, tamen la romaoj sukcese interkompreniĝas en tre granda teritorio, malgraŭ pli aŭ malpli grandaj diferencoj en siaj lingvoj kaj dialektoj, respektive. Oni konas ankaŭ diversajn klopodojn por lingvo-renovigo certe kun unuecigaj streboj, almenaŭ parte.

Ekzistas tiuj universitatoj, kie la populareco de E-o kaj la lovara lingvo estas vere granda. Ekzemple en la fako andragogio[5] de universitato de urbo Pécs 4% de la studentoj elektas ĉi tiujn du lingvojn. Laŭ la dekano de tiu fako la klarigo estas simpla: pli da studentoj lernas apud laboro, kaj ili volas gajni tempon elektante la plej facilan lingvon

La universitataj fakoj havas eblon fiksi pri kiuj lingvoj ekzameniĝu la studentoj en siaj fakoj. La fakoj povas fiksi ankaŭ tion, ĉu estas bezonata faka lingvoekzameno aŭ ne. Se tio estas fiksata, do oni ne povas ekzameni pri E-o kaj la lovara lingvo, ĉar pri tiuj lingvoj oni ne povas plenumi ŝtatan, fakan lingvoekzamenon. Ekzistas jam tiuj fakoj (ekz. la fakoj pri teknika informadiko kaj programista matematiko), kie estas akceptata nur la angla lingvoekzameno. Sed ne temas pri tio, ke kono de tiuj du lingvoj estus vana. Eĉ estas ekzemplo ke ĝuste ekz. la lovara lingvokono signifas favoron por akiri iun laborlokon, ekzemple en la sociala sfero.

Estas grave: senŝvite ne eblas ekzameniĝi ankaŭ pri ĉi tiuj lingvoj. Lastjare – laŭ la landaj indikoj – nur 50% el la studentoj elektintaj ĉi tiujn lingvojn povis plenumi sukcesan lingvoekzamenon. Ekzameniĝantoj pri aliaj lingvoj ekzameniĝis iom pli bone: ekz. du trionoj el la ekzameniĝantoj plenumis sukcesan ekzamenon pri la angla kaj germana lingvoj.

Julianna VAS-SZEGEDI

Ĉeĥio

Infan-konkurso kaj ekspozicio pri la temo 'fervojo'

Ĉeĥa E-Asocio proklamas konkurson de infanaj belartaj kaj literaturaj verkoj pri la temo FERVOJO okaze de 100 jaroj de la organizita E-movado inter la fervojistoj, en kiu ankaŭ la ĉeĥaj esperantistoj ludis gravan rolon.

Partopreni rajtas infanoj, kiuj parolas E-on aŭ lernas ĝin, ĝis 15-jaraj inkluzive (laŭ la aĝo atingita en 2009). Al la konkurso eblas sendi laborajĵojn belartajn (desegno, pentrajĵo, kungluita bildo, grafikajĵo), poemon, rakonton, fotojn nigrajn-blankajn aŭ kolorajn.

La konkurso estas starigita por du kategorioj: A: por aŭtoroj ĝis 10-jaraj, B: por aŭtoroj 11–15-jaraj. Akceptado de konkursajĵoj: ĝis la 31-a de aŭgusto 2009. Kunsido de la ĵurio: ĝis la 15-a de septembro 2009. Solena transdono de la premioj kaj inaŭguro de la ekspozicio: en aŭtuno 2009.

Pliaj informoj ĉe *www.esperanto.cz/infankonkurso aŭ Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, CZ-568 02 Svitavy, retpoŝta adreso: dvor.libuse@seznam.cz.*

[5] scienco, kiu okupiĝas pri la edukado de plenkreskuloj

Pollando

Instruista trejnado en la kunlaboro de UAM kaj ILEI

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon**, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de E-o kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 12-18.09.2009, la dua 30.01-05.02.2010) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2010. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri E-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de E-kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro.

Instruos: Katalin KOVÁTS, Maria MAJERCZAK, Zsófia KÓRÓDY, Ilona KOUTNY, Tomasz CHMIELIK, István ERTL, Aleksander KORĴENKOV.

La tradicia semajnfina kultura aranĝo **ARKONES** (18-20.09. 2009), same en Poznano, proponas agrablan amuziĝon kun teatraĵoj, filmoj, muziko, diskutoj, ktp tuj post la septembra sesio, ĉi-jare la 25-an fojon.

Informoj kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl
http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

Slovenio

Bonvenon al festivalo de lingvoj kaj kulturoj!

Festivalo de lingvoj kaj kulturoj okazos dum fama Festivalo Lent, inter la 26-a de junio kaj la 11-a de julio 2009 en slovena urbo Maribor. En la urba parko estos aparte organizita evento "Art Kamp". Dum tiu tempo ni prezentos proksimume 30 lingvojn kaj faros kurson de E-o. Samtempe ni organizas ekspozicion en la Muzeo de popola liberigo kie ni prezentos diversajn materialojn ligitajn al mondaj popoloj kaj kulturoj. Pro tio ni jam kontaktis multajn ambasadojn kaj amikojn tutmonde. Ni invitas ĉiujn partopreni en kolektado de ekspozicia materialo (unua skriblernolibro por infanoj, vortaroj, mapoj de landoj, flagetoj, popolaj simboloj, gravaj aĵoj, muzikaĵoj…). Ni aparte ĝojos se ankaŭ vi venos aŭ tra Skype-kunveno

prezentos gravajn aferojn de via propra lingvo kaj kulturo. Bonvenon al Maribor!
NdlR – La organizantoj petas ĉiujn, kiuj povas traduki la supran tekston al sia patrina lingvo (aŭ alia, se ili kapablas). Ili volas publikigi etan noton (invitilon) en kiel eble plej multaj lingvoj kaj meti tiujn tradukojn en la paĝaro www.zvik.org*. Ĉiuj viaj kontribuoj estas bonvenaj. Bv. skribi pri kiu lingvo temas, kaj aldoni vian plenan nomon kaj urbon/landon el kiu vi estas. Kontaktadreso: vesna.oradovic@gmail.com*

Usono

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) 2009

NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, festos sian 40-an jaron ĉi-somere en bela apudmara San Diego, Kalifornio, de la 29-a de junio ĝis la 17-a de julio, 2009. NASK daŭrigas sian tradician rolon kiel grava centro de plurnivela lernado kaj internacia uzado de E-o, ĉi-foje en la sino de la mondfama Universitato de Kalifornio en San Diego.
NASK 2009 konsistos el tri kursoj:
– Spomenka ŠTIMEĆ, unu el la plej elstaraj vivantaj verkistoj en E-o, gvidos seminarion pri diverskultura literaturo;
– Paŭl GUBBINS, eminenta dramaturgo kaj ĵurnalisto, instruos meznivelan kurson;
– Lee MILLER, konata usona pedagogo, instruos postbazan kurson.
Grant GOODALL, direktoro de la lingva fako de la universitato, estros la kursaron. La kursoj mem estas nur unu flanko de NASK 2009. Por kuncelebri la datrevenon venos pluraj gastprelegantoj. Ĝis nun konfirmitaj estas Humphrey TONKIN kaj Mark FETTES; aliajn oni baldaŭ anoncos. Estos ankaŭ videaj konversacioj kaj intervjuoj kun instruistoj kaj lernantoj el antaŭaj jaroj kaj el diversaj landoj. NASK estas unika evento en E-ujo pro almenaŭ du kialoj. Unue, ĝi proponas oficialajn universitatajn kursojn kiuj estas tamen malfermitaj al la tutmonda esperantistaro, sendepende de antaŭa universitata studo. Due, ĝi proponas tri-semajnan loĝadon en plene Esperanta medio. Ĉiuj partoprenantoj loĝas kune en bela kaj moderne ekipita apartamentaro, kie ĉiutage estas diversaj eventoj, kaj distraj kaj klerigaj. Esploru la novan retejon: http://esperanto.org/nask/.
Por informoj pri aliĝo, stipendioj ktp: *Ellen Eddy: <eddyellen@aol.com>*
Por informoj pri la universitato, stato de E-o en ĝi, ktp: *Grant Goodall <ggoodall@ucsd.edu>*

Intervjuo kun la rektoro de nia konferencejo

WSZiB (La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo) estas nia konferencejo por la 42-a ILEI-konferenco. Ni tie havos bonegajn kondiĉojn por konferenci. Ankaŭ la Simpozio okazos en WSZiB, kiu estas nia patrono pri la konferenco kaj kunorganizanto de la Simpozio kune kun aliaj polaj altlernejoj (UAM en Poznano, Pedagogia Universitato en Krakovo kaj La Supera Lernejo en Płock).
Ni ĉi-foje al niaj legantoj prezentas intervjuon kun la rektoro de WSZiB ***profesoro Włodzimierz ROSZCZYNIALSKI.***
La intervjuon preparis la prezidanto de LKK Małgosia KOMARNICKA kaj la membro de LKK pri informado Josip PLEADIN.

1. Ĉu vi bonvolus al ni diri iomete pri WSZiB? Kiam ĝi fondiĝis, kiom da studentoj frekventas ĝin kaj kian eduknivelon oni atingas finstudante?

Mi komprenas, ke miaj respondoj devas esti mallongaj kaj interesaj por viaj legantoj. Mi fondis WSZiB en 1995 jam kiel altlerneja profesoro, kontinuigante miajn akademiajn spertojn.
Nun ĉe ni sep mil kvincent studentoj studas sociologion, informadikon, merkatadon kaj financadon. WSZiB proksime kunlaboras kun la aŭtonomia ekonomio – la Industria-Komerca Ĉambro, Lewiatan (Komerca Retejo), BCC-aŭtonomioj de diversaj niveloj (provinco, distrikto, komunumo) kaj kun post-gimnaziaj lernejoj.



Surfote: Josip PLEADIN kun prof. Włodzimierz ROSZCZYNIALSKI (dekstre)

Tio distingas nin inter la 34 krakovaj altlernejoj, ĉar ni tiel komprenas nian servon al la ĉirkaŭaĵo.
Niaj studentoj kreas civitanan societon kaj WSZiB apogas multajn agadojn, ekde karitataj agoj ĝis fotografiaj rondoj, teatro-amantoj ktp.

2. Laŭ via opinio, kiom grava estas la lernado de fremdaj lingvoj nuntempe, se ni konsideras la mondan tutaĵiĝon kaj pli intensajn inter-popolajn kaj interhomajn rilatojn translime?

La plej grandan parton de mia adolta vivo mi travivis en ĝuste pasintaj tempoj, kiam lernado de fremdlingvoj ne estis revo de junuloj, ĉar eblecoj po iri eksterlanden estis minimumaj. Hodiaŭ venis kolosa ŝanĝo – al ni venas kandidatoj kun ĉiam pli bona kono de la angla, kaj ne mankas ankaŭ amantoj de nekutimaj, malpli kutimaj lingvoj. Ni havas grupojn kiuj lernas la ĉinan, japanan kaj E-on.

3. Kian atenton en WSZiB oni dediĉas al lernado de fremdaj lingvoj?

Ekde la komenco de nia lernejo validis la principo de du fremdlingvoj, sed la konkurenco kaj multaj devigoj, kiujn la ŝtato altrudas al nepublikaj altlernejoj ne permesas realigi tiel ambician programon. Hodiaŭ studentoj lernas unu elektitan fremdlingvon.

4. Ĉu averaĝe sufiĉas baza kono de iu fremda lingvo, aŭ, laŭ vi, en la nuntempa mondo oni devas fariĝi plurlingvanoj, parolantaj fremdajn lingvojn preskaŭ je la nivelo de la gepatra lingvo?

Estas plej bone koni multajn lingvojn, sed ne ĉiuj havas talenton, forton kaj motivigon por plenumi tion.

5. La pola eŭro-parlamentanino Małgorzata HANDZLIK, estas granda porbatalanto de la lernado de E-o kiel komuna eŭropa lingvo. Pri tio ŝi multfoje pledis inter la kolegoj parlamentanoj, sed ankoraŭ ekzistas forta kontraŭstaro al tiaj ideoj. Kio, laŭ vi, estas la kaŭzo de tia rilato, kvankam E-o montriĝis efika internacia komunikrimedo?

Analoge al politiko, decidoj pri ĝenerala, eĉ elementa signifo dependas de fortoj de tiuj kiuj preferas ilin. Se anglosaksoj gvidas la mondon ... la reston vi komprenas. Eble la generacio de miaj studentoj lernos la ĉinan?

6. Vi mem diris, ke en via junaĝo vi lernis E-on, do vi iagrade konas la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de E-o. Kio estas la avantaĝoj kaj kio la mankoj de E-o kaj, ni diru en esperantista maniero, de la E-movado?

Tio estis simpatia eduka aventuro kaj tiam ununura ŝanco (1962) por elŝiriĝi al eksterlando. Homoj, kiujn mi renkontis dum Esperanto-kongreso en Gyula[6], tio estis alia mondo – mondo de amikecaj, bonvolemaj kaj koraj amikoj.

7. Ĉu vi vidas la diferencon inter la stato kaj rolo de E-o en la periodo kiam vi lernis ĝin kaj nuntempe? En Pollando kaj internaciskale?

La diferenco, kiel rezultas de miaj antaŭaj paroloj, estas tre granda. Hodiaŭ tio estas unu el multaj ebloj.

8. La aŭtoro de Esperanto naskiĝis kaj vivis en Pollando. El tiu vidpunkto, ĉu vi vidas ian specialan rolon de Pollando en la evoluigo de E-o, kaj kiaj perspektivoj, laŭ vi, ekzistas por E-o en estonteco?

En Pollando mankas varmarkoj, kiuj promocius nian landon. La ideo de E-o, ni diru – la ideo de artefarita lingvo – malgraŭ tio ke E-o disvolviĝas kiel aliaj lingvoj, estas en certa senco idealisma. Unuflanke estas unuopaj homoj kiuj danke al tiu idealismo realigas siajn revojn kaj aliflanke politikisoj kaj lingvistoj, kiuj provas trovi argumentojn kontraŭ E-o.

9. Kial ankaŭ inter la fakuloj, do inter lingvaj spertuloj, ne ekzistas konsento pri la valoroj de E-o kiel lingvo? Ĉu ne ŝajnas al vi, ke plurfoje temas nur pri antaŭjuĝoj pri la ebleco ke "artefarita lingvo" povas funkcii kiel vera, natura lingvo?

Mi tute ne estas kompetenta por la respondo. Maksimume kiel memnomita "socia politikisto", mi povas konjekti, ke temas pri timoj similaj al tiuj kiuj akompanas la idealismajn imagojn pri kreo de monda valuto.

---

[6] Urbo en sudorienta Hungario – NdlR

10. Laŭ nia scio, E-o estis instruata ankaŭ en WSZiB kiel elektebla studobjekto. Kiuj estis la kaŭzoj, ke tiu praktiko ne ekzistas ankaŭ nuntempe, kaj ĉu ekzistas espero, ke post la ILEI-Konferenco, la kondiĉoj fariĝos denove pli favoraj por E-o ankaŭ en la institucio, kiun vi estras?

Ni estas merkata institucio, ni ricevas neniujn subvenciojn. Instruado de Esperanto en WSZiB, financita el niaj resursoj, estis provo por lingva vigligo de niaj studentoj, kun la espero ke naskiĝos movado, iniciata grupo, simpatiantoj, kiuj kun la simboloj de nia lernejo gvidos la medion. Mi scias, ke tio estas malfacila, sed nur tiakaze ni povas transpreni la financan riskon.

Ni dankas al vi, sinjoro rektoro, ke WSZiB akceptis esti la loko kie renkontiĝos pedagogoj de Esperanto.

Josip PLEADIN / Małgosia KOMARNICKA

Printempa renovigo ĉe *Juna amiko*!

La unua numero de *Juna amiko* por 2009 eniris presejon fine de marto. Ĝi realigas la renovigajn planojn anoncitaj en IPR 2008/4: nova koncepto por ke la komencaj revupaĝoj plaĉu al kiel eble plej vasta publiko – ĉefe novaj legantoj kaj novuloj al Esperanto. Unuafoje ni liveris la tutan materialon al la presejo elektronike (PDF): obstakloj tiukampe (supersignoj!) kaŭzas ioman prokraston en la aperigo. Perantoj el 30 landoj (kaj UEA) akceptas abonojn. Nunaj prezoj (A-landoj €14, B-landoj €11) validas ĝis la jarfino, egale por 2009 kaj 2010. Nepre vidu la novaspektan numeron 2009/1!

Sur la lasta kovrilpaĝo: Salminejo de Wieliczka apud Krakovo, la celo de la dua duontaga ekskurso de nia Konferenco. Ĝi situas proksime de Krakovo kaj estas unika loko enskribita en la UNESKO-liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. Multaj ĉambregoj, subteraj lagoj, preĝejoj, koncertejoj, bankedejoj, vendejoj, manĝejoj, eĉ sanigejo estas en ĝi. Sur la foto supre: la groto de Józef Piłsudski, malsupre: la kapelo de Sankta Kinga. Laŭ legendo, la salon oni malkovris danke al Sankta Kinga, antaŭ jarcentoj.

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Beloševiĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (*http://www.tejo.org/*).
UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mirejo.mireille@gmail.com*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info.*

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem.*
Presado: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5.* Rete: <*jozefo.nemeth@gmail.com*>, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*r.moerbeek@wanadoo.nl*>.


GROTA
JÓZEFA PIŁSUDSKIEGO



Tabelo 2. Komunaj referencniveloj: laŭŝtupa memtaksilo

		A1 - Alpaŝo	A2 - Elano	B1 - Salto	B2 - Flugo	C1 - Aŭtonomeco	C2 - Pinto
KOMPRENADO	 **Aŭda ricevado** (aŭskultado)	Mi kapablas rekoni konatajn vortojn kaj tre bazajn vortogrupojn pri mi mem, pri mia familio kaj pri konkretaj aferoj en la proksima medio, kondiĉe ke oni malrapide kaj klare parolas.	Mi kapablas kompreni la plej ofte uzatajn vortojn kaj esprimojn, kiuj rilatas al mi (ekz. tre bazajn informojn pri mi, mia familio, butikumado, loka medio, laboro). Mi kapablas kapti la esencon en mallongaj, klaraj, simplaj mesaĝoj kaj anoncoj.	Mi kapablas kompreni la ĉefaĵojn en klara laŭnorma parolo pri ĉiutagaĵoj en laboro, studo, libera tempo k.s. Mi kapablas kompreni la esencon en multaj radio- aŭ televid-programoj pri aktualaĵoj aŭ pri temoj, kiuj apartenas al mia persona aŭ faka intereskampo, se oni parolas relative malrapide kaj klare.	Mi kapablas kompreni iom longajn paroladojn kaj prelegojn, kaj sekvi eĉ kompleksan argumentadon, se la temo estas sufiĉe konata. Mi kapablas kompreni plej multajn televidprogramojn pri novaĵoj kaj aktualaĵoj. Mi kapablas kompreni la plej multajn filmojn en laŭnorma lingvaĵo.	Mi kapablas kompreni iom longajn paroladojn, eĉ se ili estas neklare strukturitaj, kaj kiam rilatoj estas nur implicaj kaj ne eksplice signalitaj. Mi kapablas preskaŭ senstreĉe kompreni televidajn programojn kaj filmojn.	Mi kapablas kompreni sen ajna malfacileco ĉiajn parolojn, ĉeestajn aŭ elsenditajn, eĉ se la parolado okazas en rapida denaskuleca ritmo, se mi havas iom da tempo por alkutimiĝi al la akĉento.
	 **Vida ricevado** (Legado)	Mi kapablas kompreni konatajn nomojn, vortojn, tre simplajn frazojn, ekzemple en anoncoj, sur afiŝoj aŭ en katalogoj.	Mi kapablas legi tre mallongajn, simplajn tekstojn. Mi kapablas trovi atendeblajn, konkretajn informojn en ĉiutagaj tekstoj (ekz. en mallongaj anoncoj, flugfolioj, menuoj, horaroj) kaj mi komprenas mallongajn privatajn leterojn.	Mi kapablas kompreni tekstojn, skribitajn ĉefe en ĉiutaga lingvaĵo aŭ en faka lingvaĵo proksima al mia laboro. Mi kapablas kompreni la priskribon de okazaĵoj, sentoj kaj deziroj en privataj leteroj.	Mi kapablas legi artikolojn kaj raportojn, kiuj okupiĝas pri nuntempaj problemoj, kaj en kiuj la aŭtoro esprimas opinion aŭ vidpunkton. Mi kapablas kompreni nuntempan literaturan prozon.	Mi kapablas kompreni longajn kaj kompleksajn, prifaktajn kaj literaturajn tekstojn, rimarkas en ili la diversajn stilotrajtojn. Mi kapablas kompreni fakajn artikolojn kaj longajn teknikajn priskribojn, eĉ kiam ili ne rilatas al mia fako.	Mi kapablas senprobleme legi preskaŭ ĉiujn formojn de skriba lingvo, inkluzive de abstraktaj, strukture aŭ lingve kompleksaj tekstoj, kiel manlibroj, fakartikoloj kaj literaturaj verkoj.
PAROLADO	 **Parola interagado**	Mi kapablas komuniki, se la parolpartnero pretas ripeti sian diraĵon malpli rapide aŭ esprimi sin en alia maniero, aŭ helpas formi miajn frazojn. Mi kapablas starigi kaj prirespondi simplajn demandojn pri ĉiutagaj bezonoj aŭ tre konataj temoj.	Mi kapablas en simplaj, rutinaj situacioj simple kaj senpere interŝanĝi informojn pri la ĉiutagaj agoj kaj temoj. Mi kapablas efektivigi tre mallongan informinterŝanĝon eĉ tiam, kiam mi kutime ne sufiĉe komprenas por memstare subteni la konversacion.	Mi kapablas elturniĝi en la plimulto de la lingvaj situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en teritorio, kie la lingvo estas parolata. Mi kapablas senprepare partopreni en konversacio pri temoj konataj, ĉiutagaj aŭ apartenantaj al mia intereskampo (ekz. familio, libertempo, laboro, vojaĝo kaj aktualaĵoj).	Mi kapablas komuniki nature, facile kaj senĝene. Mi kapablas aktive partopreni en diskutoj pri konataj temoj, kaj mi argumentante esprimas mian opinion.	Mi kapablas esprimi min kontinue kaj senstumble, malofte serĉas vortojn kaj esprimojn. Mi kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike en diversaj sociaj kaj fakaj kontaktoj. Mi kapablas precize esprimi miajn pensojn kaj opiniojn; mi kapablas ligi miajn alparolojn al tiuj de la parolpartneroj.	Mi kapablas senpene partopreni en ajna konversacio aŭ diskuto kaj mi bone regas idiomaĵojn kaj parolturnojn. Mi kapablas paroli flue, bonstile, distinge esprimante ankaŭ delikatajn nuancojn. Mi kapablas, se mi blokiĝas, rekomenci kaj rekompili mian parolon tiel, ke la blokiĝo apenaŭ rimarkeblas.
	 **Parola produktado**	Mi kapablas per simplaj vortogrupoj kaj frazoj prezenti miajn loĝlokon kaj konatulojn.	Mi kapablas per simplaj vortogrupoj kaj frazoj paroli pri miaj familianoj kaj aliaj personoj, pri miaj vivkondiĉoj, studoj, nuntempa aŭ la antaŭa faka aktivado.	Mi kapablas en simpla maniero kunligi vortogrupojn por paroli pri travivaĵoj, okazaĵoj, miaj revoj, esperoj kaj celoj. Mi kapablas mallonge klarigi kaj pravigi miajn opinion kaj planojn. Mi kapablas rakonti okazintaĵon, aŭ la intrigon de libro aŭ filmo, kaj priskribi miajn reagojn.	Mi kapablas klare kaj kun sufiĉaj detaloj esprimi min pri pluraj temoj rilataj al mia intereskampo. Mi kapablas esprimi mian opinion pri aktuala temo, detalante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la diversaj ebloj.	Mi kapablas priskribi klare kaj detale kompleksajn aferojn tiel, ke mi enplektas ankaŭ aliajn rilatajn temokampojn, kelkajn erojn detalas kaj mian direndaĵon taŭge finas.	Mi kapablas klare kaj kontinue, mian stilon adaptante al la situacio, priskribi aŭ detali ion ajn. Mi kapablas konstrui mian prelegon laŭlogike, kaj helpi la aŭskultanton kompreni kaj memori la gravajn punktojn.
SKRIBADO	 **Skriba produktado**	Mi kapablas skribi mallongan kaj simplan poŝtkarton, ekzemple por sendi feriajn salutojn. Mi kapablas plenigi formularon per miaj personaj detaloj, ekzemple per miaj nomo, nacieco kaj adreso ĉe hotela registriĝo.	Mi kapablas skribi mallongajn, simplajn notojn kaj mesaĝojn rilate ĉiutagajn bazajn bezonojn. Mi kapablas skribi tre simplan personan leteron, ekzemple por danki iun pro io.	Mi kapablas skribi simplajn, koherajn tekstojn pri temoj, por mi konataj aŭ rilataj al mia intereskampo. Mi kapablas skribi privatajn leterojn pri miaj travivaĵoj kaj impresoj.	Mi kapablas verki klarajn kaj detalajn tekstojn pri vasta gamo da temoj, rilataj al mia intereskampo. Mi kapablas verki eseon aŭ raporton, kiu peras informojn kaj listigas argumentojn kaj kontraŭargumentojn pri iu vidpunkto. Mi kapablas skribi leterojn, en kiuj mi emfazas kian gravecon mi donas al okazaĵoj kaj travivaĵoj.	Mi kapablas esprimi mian starpunktojn en klara, bone konstruita longa teksto. Mi kapablas skribi pri kompleksaj temoj en letero, eseo, raporto, emfazante la atendindajn erojn. Mi kapablas adapti mian stilon al la celita leganto.	Mi kapablas skribi klaran, fluan teksto en adekvata stilo. Mi kapablas skribi kompleksajn leterojn, raportojn aŭ artikolojn, kiuj prezentas ion en efika, logika strukturo, kiu helpas la leganton kapti kaj memori la gravajn punktojn. Mi kapablas resumi fakajn kaj literaturajn verkojn kaj skribi pri ili kritikajn analizojn.

© Council of Europe: Assessment Grid / Language Portfolio